

Turka Stelo



SALUTON,

La pandemio daŭras!

La Internacia Organizo pri Sano anoncis, ke la nombro de la infektitaj homoj pro la kronviruso dum pli ol du semajnoj malaltiĝas, kaj ankaŭ la nombro de mortintoj tiel faras.

Ganao estas la unua el la malriĉaj landoj, kiu profitis pro la COVAX iniciato kaj jam ricevis vakcinojn por siaj civitanoj.

Sed ĉio ĉi ne estas kialo, por ke ni ne plu porti maskojn kaj enmiksiĝi en la amasoj. Ĉiuj ankoraŭ timas pro ebla tria ondo de la pandemio.

Eble estus pli saĝa decido resti hejme kaj legi la revuon "Turka Stelo". Eble estus eĉ pli bone se vi provus kontribui al nia revuo. Traduku aŭ verku rakontojn, eseojn, poeziaĵojn ktp kaj sendu ilin al ni, por ke ni publikigu ilin en nia revuo. Tiel profitos esperantistoj de diversja niveloj tra la tuta mondo.

Ankaŭ ne forgesu partopreni al la Esperanto-Sumoo organizadon por legi librojn kiuj kuŝas en via breto.

Oni diras, ke vakcinoj helpas al ni meti bridon al la pandemio komence de 2022. Ni esperu, ke tio, tiel okazos.

En ĉi tiu numero vi trovos interesajn artikolojn por via legado kaj por pasigi tempon en via hejmo. Ne hezitu proponi "Turka Stelo" revuon al viaj konatuloj kaj tiel pligrandigi nian legantaron. Turka Stelo estas senpaga monata kaj amatora revuo de Esperantujo!

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

| | |
|--|----|
| Malfermo | 1 |
| Enhavtabelo | 2 |
| Kursoj | 2 |
| Tago de la Gepatra Lingvo | 2 |
| Sumoo | 3 |
| UEA | 3 |
| TEJO | 3 |
| Leteroj de niaj legantoj | 4 |
| Ciklo kun Hori Jasuo | 4 |
| Tempo Sigelita | 5 |
| PROTEZILAO kaj LAODAMIA (ΠΡΩΤΕΣΙΛΑΟΣ και ΛΑΟΔΑΜΕΙΑ) | 6 |
| Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo | 9 |
| El la libro de "Dao de Jing" | 10 |
| La Kimero - Rakonto el la estonteco (10) | 11 |
| Korniko | 12 |
| Tusilago | 12 |
| El la literaturaj paĝoj de MAS | 13 |
| Pardonon mi petas | 14 |
| Resumaj Kaanzonoj | 15 |
| Esperantistoj malaperigis Esperanton | 16 |
| Poeziaĵoj de Ilir Zhiti | 17 |
| Amuza Matematiko | 18 |
| Astrologio - Februaro/Akvistoj | 18 |
| Kuŝanta ino kun violono (1988) | 19 |
| Adulti | 20 |
| Signoj | 20 |
| Hajkoj | 21 |
| Paca Himno (EKRA2020) | 21 |
| Mirinda renkonto (5/10) | 22 |
| La manuskripto | 23 |
| La tute aparta kato (parto 2) | 24 |
| Esperanto kaj plurlingva estonteco | 26 |
| Ŝercoj | 27 |
| Krucvortenigmo | 27 |
| HO, HOMARO! (aŭ invito al medito) | 28 |
| "Lernejo sen malsukceso en la ekzameno" de Dr. Kudo Nobuo | 28 |
| Solvo de la krucvortenigmo | 31 |
| Facilaj rakontoj | 32 |

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

22/11 Akuzativo

29/11 Transitiveco

06/12 Participloj

13/12 Korelativoj

20/12 Prepozicioj

27/12 Sufiksoj

03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Tago de la Gepatra Lingvo, 21a februaro

Uluslararası
ANA DİL GÜNÜ
21 Subat 2021

Esperanto dilinin kullanımı sayesinde
her bir kişinin dil ve kültürel kimliğine
saygı duyulur.

Daha fazlası için: www.lingvo.info Haklar arası iletişim hakkında: www.esperanto.net | www.uea.org

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 5 grupoj. Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata Jokozuna. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: Oozeki, Sekiŭake, Komusubi, Maegasira.

Okaze de tiuj konkursoj, mi proponas al vi partoprenon en lukto, kie homo ne luktas kontraŭ aliaj homo, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj. Tiu estas la Esperanto-Sumoo konkurso en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj ni legu Esperanto-librojn dormantajn en nia breto.

Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon.

Ni partoprenu kaj luktu ĝoje!!!

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 931 (2021-02-22)

Biblioteka Apogo Bachrich: alvoko 2021

Ĉi-jare UEA disdonos

ankoraŭfoje subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne ricevas ŝtatajn, urbajn aŭ aliajn movadajn subvenciojn. [...]

N-ro 930 (2021-02-10)

Afrika Komisiono havas novan kunordiganton: D-ro Elisee Byelongo

Post pluraj monatoj sen kunordiganto en la Afrika komisiono, la Estraro de UEA aprobis D-ron Elisee Byelongo por kunordigi ĝin. [...]

N-ro 929 (2021-02-05)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2021

[Mesaĝo sendota al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!]

Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2021. [...]

N-ro 928 (2021-02-03)

Nova titolo en la Serio Oriento-Okcidento: Antologia skizo de la persa literaturo (n-ro 58)

Antologia skizo de la persa literaturo. Pluraj aŭtoroj. El la persa trad. Said Baluĉi. Moskvo: Impeto, 2021. 164 p. ISBN 978-5-7161-0311-5. Serio Oriento-Okcidento n-ro 58. [...]

TEJO



Malferma Tago por Patronoj

Ĉiuj Patronoj de

Tejo estas invitataj

al la Malferma Horo por Patronoj! Estos okazo babili kun estraranoj de TEJO kaj aliaj patronoj, rakonti al ni viajn spertojn, konsilojn, ideojn, grumbli pri avangarda lingvouzo, miri kaj informiĝi pri niaj lastatempaj agadoj kaj kiel via subteno utilas al la junulara Esperanto-movado! [...]

Retoso: la nova reta evento de TEJO!

Kun granda ĝojo ni invitas vin al Retoso!

Retoso estas la nova reta evento de TEJO organizita de junuloj kaj por junuloj. Ĝi okazos inter la 2-a kaj la 5-a de aprilo. Malaĉa programo atendas vin: vi povos amuziĝi, ludi kvizojn, koncertumi, partopreni en prelegoj aŭ diskutrondoj. Kaj la programeroj okazos en diversaj horzonoj! [...]

Prelegu en la Internacia Reta Interfaka Simpozio (IRIS)

La komisiono de TEJO pri Edukado, Scienco kaj Kulturo organizas la Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS) de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo 2021. IRIS okazas kunlabore kun Retoso, la nova reta evento de TEJO. [...]

TEJO dungas subvencipetiston

TEJO serĉas novan subvencipetiston.

Kontrakto: minimume 20, maksimume 40 horojn semajne por unu jaro kun ebleco de plilongigo.

La salajroj estos preparolataj kun individuaj kandidatoj surbaze de iliaj spertoj. [...]

Leteroj de niaj legantoj



Kara amiko,
mi tre dankas vian novan eldonon de Turka Stelo. Permesu kritiketon ioman:
"Jam naĝis en nia regiono sed la naĝo ne restis tre longe sur la grundo..."

Sed certe vi ja celis al neĝo, ĉu ne?

Danke kaj amike,

Utho Maier el Germanio



Kara amiko,
Mi verŝajne ne estas sola kiu rimarkos; sed kaze, ke aliaj ne skribas al vi: en la kovrilpaĝo "naĝ~" devas esti "neĝ~" (2-foje).
La posta "neĝo" jes ja estas ĝusta!

"Jam neĝis en nia regiono sed la neĝo ne restis tre longe"

lom poste: "vakcini" sufiĉas; ne necesas "vakcinigi".

Krome, mi havas pri la revuo nur entuziasmon kaj laŭdojn!

Tutkore salutas, havu belan tagon!

Lode Van de Velde el Belgio



Koran dankon pro tiu nova numero de Turka Stelo

Franciska Toubale el Aŭstralio



Koran dankon por la stelo.
Nepre mi ĝojas, ke ĝi enhavis mian katorakonton.

Ege dankon kaj saluton.

Margarete Bastian el Germanio



Estimata, mi elkore dankas al vi pro la februara numero de revueto Turka Stelo. Ĝi estas ege bona kaj impona. Mi bodeziras al vi sukceson en ĝia daŭra redaktado kaj eldonado. Hodiaŭ mi sendas al vi plian mian

humuran rakonton kaj bondeziras al la legantoj plezuron dum legado.

Amike ĉiam

Laimundas Abromas el Litovio



Saluton kaj dankon pro la revuo. Ĝi ĉiam ĝojigas miajn tagojn komencmonate.

Fartu bone kaj daŭrigu la bonajn agadojn!

Amike,

Luiza Carol el Israelo



Karaj, mi dezirus uzi vian revuon por gratuli ĉiujn geamikojn en Azio, kiuj festas Novan Jaron laŭ la luna kalendaro kaj mi deziras sanon, amon kaj sukcesojn.

Rumjana Budinova el Bulgario

Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Kontraŭ la virus'
helpos distanco, maskoj...
Saĝaj junuloj!...



Belegaj birdoj
en la trankvila akvo.
Taga medito...




La pluv' ekkantis –
la vivuloj vigliĝis.
Printempa ĝojo.



Floro legendo –
Papaveto je l' kampo.
Ruĝa beleco.
Falas ĝiaj petaloj –
simbol' de dormo kaj mort' ...




verkis kaj sendis **Elena Popova**
el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



ĈIELA ŜIPO (HIMMELSKIBET) (1918 muta filmo)

La vorto astronauto venis en mian kapon. Se ni iros al ĝiaj radikoj en la greka lingvo, ĝi signifas Stelo-Naviganto aŭ "maristo de steloj". La ĉefrolulo en la filmo, kapitano Avanti Planetaros, ankaŭ estas "stel-maristo". Ni vidas lin kiel sukcesan kapitanon revenantan de ekspedicio. Post iom da tempo, li decidis komenci aviadon, inspirita de la ideoj kaj kalkuloj pri Marso kaj spaco de sia profesoro patro.



La plej grava fonto de inspiro por kapitano Planetaros estas Kristoforo Kolumbo, kies pentraĵo pendas sur la muro en lia ĉambro. Li posedas la pasion kaj idealismon de Kolumbo. Kaj estas preta je ĉiakosto ekvojaĝi. Planetaros rigardas Marson kaj spacon, el la observatorio de sia patro, kaj kiam je vesperiĝo li iras al sia ĉambro li parolas kun la pentraĵo de Kolumbo pri siaj ambicioj kaj problemoj: "Ankaŭ oni ridis je vi, kiam vi parolis pri vojaĝo tra la mondo ..." diras li.

Li faras provojn de aviad-pilotado. Ĝi suprenleviĝas eĉ pli alte ol tiuj, kiuj antaŭe flugis. Li



rakontas pri sia misio, pri kiu li jam decidis, al sia fratino kaj al Kraft. Li petas iliajn helpojn konstrui la ŝipon, kiu iros al kosmo.

lutage venas profesoro Dubius, la konstanta gasto de la domo. Li parolas kun la profesoro. Tiam eniras la kapitano kaj diras, ke li plenumos la sonĝon de sia patro, kaj ke ili konstruos la ŝipon por iri al Marso kun Kraft, sed Dubius ridas kaj mokas lin. Dubius estas la kontraŭa rolulo en la filmo, eble ia groteska kaj iomete moligita fiula prsoneco. Ĝis la fino de la filmo ni atestas pri liaj mokaj kaj malhelpemaj kondutoj. Li ankaŭ estas ĵaluza homo, ĵaluza ĉar li mem ne povas fari tion.

Kapitano Avanti Planetaros kaj Kraft kune starigas grandegan laborejon, kie ili preparos la planojn kaj konstruos la kosmoŝipon Excelsior (latindevena vorto kiu signifas "ĉiam pli alten!"), kiu iros al Marso. Venas la tago, kiam kapitano Avanti, nia heroo, konferencos en la Scienca Societo. Dubius, kiu legas la novaĵon en ĵurnalo, ne maltrafas la okazon. En la punkto de la konferenco, ankaŭ la insulta kaj malĝentila viro David Dane estas inter la partoprenantoj. Ni vidas lin por la unua fojo. Li estas usonano.

Komenciĝas la kunveno. Kapitano prezentas bildojn sur ekrano de filmo. Ni povas diri, ke ĝi estas la prapatro de PowerPoint-prezento aplikaĵo en la jaro 1918.

Li klarigas, ke ili laboris por la ŝipo dum du jaroj. Dubius eniras la salonon. Li rigardas sarkasme starante en la malantaŭo.

Kaj Planetaros klarigas, ke ili sukcesis konstrui la kosmoŝipon Excelsior, kiu iros kun rapideco de 12,000 km dum unu horo. Li klarigas, ke ili ekvojaĝos, kiam Marso kaj tero estas plej proksimaj unu al la alia.

Li diras, ke ili jam komencis serĉi volontulojn por la ŝipanaro, ĝuste tiam, kiam Dubius ekparolas kaj iras sur la podio. Li diras, ke tio ne estas kunveno en Scienca Societo, sed en frenezulejo. Li diras, ke li esperas, ke en la fino prudento regos.

"Ĉiu, kiu malfermis novan eraon, estis subtaksita" diras la Kapitano. Li aldonas, ke li estas decidita plenumi sian mision kaj esti utila al la homaro.

"Kiel vi povas kredi, ke vi ricevos rezultojn de tio, al kio mi dediĉis mian vivon, pere de nur dujara laboro?" diras la ĵaluza profesoro.

"La Oriento salutas vin kaj sendas

>>29

Kiu estas la plej granda forto en la mondo de la homoj?

Al tiu demando estas donataj diversaj respondoj, tamen la vero estas unu! Senhezite mi respondas: "la amo!" kaj mi opinias ke tio estas jam mult-foje pruvita de la vivo, de la historio de la homaro; jes, la amo estas la plej potenca reganto de la homa vivo!

La malnovtempuloj diradis, ke sen amo la vivo havas nek guston, nek esencon, nek celon; ili kredis, ke la homo estas vere feliĉa nur kiam li povas ami arde ion ajn. Estas pro tio, ke ili lasis al ni multajn, belajn diraĵojn, el inter kiuj mi distingas tion: "se vi ne havas ĉion kion vi amas, amu tion kion vi havas!".

Estas ja en ĉiuj popoloj kaj tradicioj multaj similaj proverboj, sed, mi, kiu ĉi tie okupiĝas pri la rakontado de helenaj mitoj, haltas ĉe la antikva diraĵo "la amo eĉ monton movas!". Mi, sincere, kredas ke tio estas tute vera!



Estis juna viro nomata Protezilao, la pli aĝa filo de Ifiklo (Ιφικλής), la suvereno de Filako (Φυλακή), regiono de Tesalio (Θεσσαλία). Tiu Protezilao estis viro bonkora, nobla kaj, kiel ĉiuj samrangaj junuloj de tiu epoko, li estis bone ekzercita en la armiloj, li estis unu forta, lerta kaj kuraĝa militisto. Tamen, li ne okupiĝis pri tiaj aferoj, ĉar en la regiono de sia propra patrujo regis tiam longa paco. Nu, Protezilao ne alfrontis malfacilaĵojn kaj danĝerojn krom la ordinaraj dolĉaj kortikloj de la juneco. Objekto de lia intereso kaj kaŭzanto de la lia senorda korbatado estis tre bela junulino, nomata Laodamia, filino de Akasto (Άκαστος), nobelo loĝanta en la najbara civito, lolko

(Ιωλκός).

Ŝajnas ke estis interŝanĝitaj elokventaj rigardoj, eble ankaŭ kelkaj paroloj, la certo estas, ke la junulino reciprokis la sentojn de Protezilao, tamen ĉio tio ĉi komenciĝis kiam Laodamia estis ankoraŭ tre juna adoleskantino. La gejunuloj, do, travivadis ankoraŭ sian belan, rozan periodon de la unua, flama eroto.

La tempo pasis en agrabla sereno, ĝis kiam Tesalio atingis la novaĵo pri la terura ofendo kiun faris al la Helenoj reĝo de malproksima regno, de la Trojanoj (Τρώες). Estis la vere terura, ekstrema ofendo, farita al unu el la plej grandaj helenaj suverenoj, la reĝo de Sparto (Σπάρτη) Menelao (Μενέλαος), estis la forrabo de ties edzino Helena (Ελένη) fare de Pariso (Πάρις), reĝido de Trojo (Τροία). La malbonan informon sekvis invito de Agamemnono (Αγαμέμνων), la plej potenca kaj respektinda helena regnestro, reĝo de Argo (Άργος), sendita al ĉiuj helenaj regnestroj. Estis invito al kunveno kaj interkonsiliĝo pri la reago de Helenujo, estis interkonsiliĝo de milito!

Kompreneble, tiun kunvenon partoprenis ankaŭ la patro de Protezilao, la regnestro Ifiklo, kiu, reveninte al la patrujo, tuj ordonis la kiel eble plej urĝan kaj bonan preparadon de armeo, la estrecon de kiu li komisiis al sia pli aĝa filo, al Protezilao.

En la lando longe regis febra moviĝo, tumulto, ĉiuj laboradis forte kaj sencese, kaj, kompreneble, la respondeco de Protezilao estis peza, liaj taskoj estis multaj, komplikaj, malfacilaj, tamen la junulo pruviĝis tute taŭga kaj kapabla. Post kelka tempo, kvardek novaj, grandaj militŝipoj, tute bone armitaj kaj provizitaj estis tute pretaj kaj armeo el bone ekzercitaj lokaj militistoj atendis la signalon de la ekiro.

La ĝenerala preparado de la tiom granda, komuna ekspedicio de preskaŭ ĉiuj helenaj landoj, estis afero tre komplika kaj tempovora. Do, en Filako, la patrujo de Protezilao, la unuan tumulton sekvis la kvieteco de la atendo, do, la junulo povis denove lasi sin al la bela revado pri siaj propraj aferoj, pri la kara amatino, pri sia dolĉa amsuferado!

Estis jam pasinta sufiĉa tempo, sufiĉa por ke Laodamia atingu la taŭgan aĝon, ke ŝi estu edziĝopreta. Sub la beno de sia patro, Protezilao faris ĉion kion li devis fari, sekvis la fianĉiĝo de la feliĉaj gejunuloj kaj estis komencita la preparado de la brila nupto. La gefianĉoj travivadis siajn plej feliĉajn tagojn, ĉio ŝajnis ideala, belega, perfekta, tamen, la



antaŭtagon de la edziĝa ceremonio kaj la brila publika festo, atingis Filakon fatala mesaĝo, la signalo pri la kiel eble plej urĝa ekiro de la floto!

Estis subita, kruela interrompo, neniigo de la sennuba feliĉo de la enamiĝintaj gejunuloj.

La ordono de la centra milita administracio estis tute klara kaj ne prokrastebla, la pli multaj helenaj armeopartoj estis jam ekirintaj, do, ankaŭ la armeo de Protezilao devis tuj ekiri.

Malgraŭ tio, la nupto okazis, ĝi estis solena, riĉa kaj brila, tamen la tuta etoso en la familioj de la geedzoj, en la tuta lando estis ne kiom ĉiuj atendis festa kaj agrabla, regis sombreco kaj melankolio. La ridojn de Laodamia sekvis ploroj, ĉio estis preskaŭ funebra.

La nupta ceremonio estis finita, la novgeedzoj por la unua fojo restis kune, tute solaj, ili ĝuis kiom ili ĝuis sian unuan geedzan nokton kaj la matenon ili disiĝis. Protezilao kaj lia pli juna frato Podarko (Ποδάρκης) ordonis la enŝipiĝon kaj la ŝipoj, la unu post la alia, eliris el la haveno akompanate de la salut-krioj, vivuoj, benoj sed ankaŭ de la prorado de la popolo.

Al Laodamia restis la memoro de la malmultaj feliĉaj horoj de sia sola geedza nokto kaj la ĵuroj kaj promesoj de ŝia edzo pri ne longa foresto, pri baldaŭa reveno!

Same malfeliĉa estis kompreneble Protezilao, tamen la multaj kaj tre seriozaj taskoj, la respondeco pri la komandado de tuta armeo, la malfacila navigado, ĉio tio ĉi ne lasis al li la tempon pensi nur pri sia propra malfeliĉo.

La ŝipoj de Filako, la floto de Protezilao, estis inter la unuaj kiuj alproksimiĝis al la troja lando. Kompreneble, la elŝipiĝo de la helena armeo estis ne facila afero; la Trojanoj, plenarmite atendis la invadintojn kaj iliaj taĉmentoj da arkistoj estis vicigitaj sur la tuta, senlima marbordo, pretaj bonakcepti per pluvo da sagoj la malamikojn.

Krom tio estis disvastigita al ĉiuj helenaj armeopartoj la famo, ke al la komandantoj estis donita orakolo, laŭ kiu, la Heleno kiu la unua piedtuŝos la trojan teron, tuj mortos.

La ŝipoj atingis la teron, la helenaj arkistoj komencis ŝtorme reciproki la malamikajn sagelfetojn kaj la sturmopretaj batalantoj, kovrite per la ŝildoj atendis la lastajn manovrojn por la alteriĝo.

La plej granda kaj fama helena heroo, Aĥilo (Αχιλλεύς), estro de la teruraj Mirmidonoj (Μυρμιδόνες), estis tiu kiu la unua alsaltis sur la bordon. Multaj viroj vidis tion, tamen nur la pli proksimaj atentis, ke la heroo ĵetis sur la sablaron grandan ŝildon kaj poste li elsaltis el la ŝipo kaj surteriĝis sur ĝin, liaj piedoj ne

tuŝis la teron.

Protezilao, kiu de malproksime vidis ke Aĥilo staras sur la malamika bordo, la dua elsaltis el sia ŝipo, sekvate de siaj kunuloj, kaj staris sur la sabla tero.

Jes, mi ĝuste diras, ke Protezilao estis la dua kiu elsaltis, tamen li estis la unua kiu piedpuŝis la trojan teron! Kaj, jes, la fatala orakolo estis tute ĝusta, post la unuaj paŝoj, malamika lanco,

terura, peza lanco, ĵetita de la plej forta troja brako, tiu de Hektoro (Έκτωρ), la ĉefa komandanto kaj plej granda troja heroo, trapasis la kirason, trapikis la bruston de Protezilao, la malfeliĉa junulo falis, la brila bravulo tuj mortis!

Estis dramo, estis terura tragedio, tamen estis milito kruela kaj Podarko, la frato de Protezilao, kiu sekvis lin en la komandado de la armeo, povis nur enterigi sufiĉe kontentige, dignoplene la karan perditon, li ne havis la eblon sendi mesaĝon al la patrujo kaj tio okazis post longa tempo, post preskaŭ du jaroj.

Laodamia, kiu dum la tuta tiu tempo pasigis siajn tre malfeliĉajn tagojn skribante al sia amata edzo leterojn, kiujn ŝi ne povis sendi, karesante liajn donacojn, ĉiujn objektojn kiun li estis tuŝinta, parolante laŭtvoĉe al li kaj senĉese plorante, akceptis la teruran novaĵon kiel baton de mil fulmoj. Ŝi perdis la konscion, ŝi perdis la percept-kapablon, la kontakton kun la realo, ŝi parolis al neniu, ŝi vagadis sencele tie kaj tie en la hejmo, sur la stratoj, ŝi rigardadis ĉirkaŭen kun mieno plena je miro kaj surprizo, sed ŝi vidis nenion!

Estis longa, ĝenerala publika funebro, tamen ŝiaj gepatroj, familianoj, amikoj, ĉiuj staris apud ŝi, ili klopodis ŝin helpi, tamen ili povis nenion fari, nenion oferi al ŝi. La tempo pasis, la situacio ne ŝanĝiĝis kaj Laodamia kaŝe kontaktis kun ne tre konata skulptisto, kiu, kontraŭ tre alta honorario, faris por ŝi skulptaĵon el vakso, prezentantan viron en natura grandeco. Kaŝe ŝi enigis la skulptaĵon en sian ĉiam ŝlositan dormoĉambron kaj ŝi restis tie, tenante ĝin, tenante sian karan Protezilaon, en sia brakumo, karesante,





kisante,
parolante al
ĝi; ŝi kredis
ke apud ŝi
estas viva ŝia
amata edzo!
Tute
hazarde, de
duonfermita
fenestro,
servisto
distingis viran
ombron en la
ĉambro de la
junulino, kaj
opiniante ke
nekonata viro
enŝteliĝis en la domon, tuj sciigis tion al sia mastro. Tiele malkovriĝis la terura vero, Laodamia estis freneza!

Dume, en Hadeso (Αἵδης), en la subtera mondo de la mortintoj, Protezilaos kondukis same freneze. Komprenoble, oni ne povas diri, ke mortinto povas esti aŭ ne esti freneza, tamen mi diras tion, ĉar la animo de la krule batita de la destino viro, ne povis trankviliĝi. La mortinta Protezilaos ne povis tute deiĝi de la surtera mondo, ĉar tie estis la feliĉo kiun li rajtis ĝui, kiu estis tiom maljuste deprenita de li. La animo de Protezilaos terure suferis, ĝi kontraŭstaris al la forgesemo, ĝi ne sin lasis al la sereno de la morta mondo.

Tion observis Persefona (Περσεφόνη), la reĝino de Hadeso, kiu pasigis la duonan jaron en la supra mondo kaj tial tre bone ŝi sciis la pasiojn de la vivuloj kaj la mortuloj. Ŝi, do, alvokis Protezilaon kaj demandis lin pro kio li tiom multe suferas. La malbonsorta viro parolis al la bonkora diino pri sia granda, neforviŝita amo, pri tio, ke li ne havis la tempon ĝui la feliĉon, kiun li rajtis, kiun li gajnis post tiom longa korsuferado. Fine, li petegis la diinon, ke ŝi permesu al li reveni al la supra mondo por nun kelka

tempo, por ke li havu unu ankoraŭ okazon gustumi ion el la feliĉo, kiu tiom maljuste estis forprenita de li.

La diino kortuŝiĝis, ŝi donacis al li tri tagojn kaj Protezilaos mirakle prezentiĝis antaŭ Laodamia!

La duon-freneza virino ekvidinte lin, supozis ke ĉio antaŭa estis malvera, ke ŝia edzo ne mortis, ke li revenis el la milito, ke ĉio alia estis nur malbona sonĝo. Ŝi malfermis sian brakumon, ŝi akceptis sian amanton kaj dum tri plenaj diurnoj, la plenkontentaj geedzoj travivis la tutan feliĉon kiun ili rajtis ĝui. Tiuj tri tagoj egalas multajn jarojn, tamen ili pasis kaj kiam Protezilaos devis foriri, kiam li devis por la dua fojo morti, konfesis al Laodamia, ke li ne estas vivanta, ke li apartenas al la mondo de la mortintoj al kiu li devas nepre reveni.

Laodamia ne tuj konsciis la gravecon de liaj paroloj, longe restis silenta, nekredema, dubanta pri la nova severa vero kiu batis ŝin, sed tuj poste, ŝi eltiris ponardon kaj senhezite eniĝis ĝin en sian bruston!

Ŝi falis! ŝi mortis!

La du animoj, la ombroj de la geamantoj strikte interbrakumite, per paŝo trankvila eniĝis en la malsupran mondon, ili definitive malaperis!

Tio estas la fino de vere amara, tragedia historio, kiu tamen lasas al mi ian guston dolĉan. Dirante tion mi revenas al la komenco de tiu ĉi mia rakontado, kie mi skribis pri la forto de la amo, por aldoni, ke la historio de Protezilaos kaj Laodamia montras al mi, ke la amo ĉion, eĉ la morton, venkas!

Estas superflue diri ke la historio de la malfeliĉaj geamantoj vekis la intereson de multaj ĉiafakaj famaj artistoj kaj naskis valorajn artaĵojn.

Protezilaos mortis tre frue, tamen li restas por eterne senmorta sur la ĉielo, en formo de asteroido (3540), de kie li rakontas sian tristan historion!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

10>> Venĝo? Kolerio? En forgeson!

Jen pardon' al malamik'
Liaj larmoj havu ĉeson,
lin ne boru pento-pik'.

Ĥoro: En ŝuldlibroj plu nenio!
Mondon regu harmoni!
Fratoj! Kiel juĝis vi,
tiel juĝos pri vi Dio!

(nekompleta)

Mi ne povas imagi, ke Ŝilero tute ne konis la faman tekston. Tio estas pruvo, kiom profunde la pensado de Laocio jam en la kleriga tempo de la germanaj „nanoŝtatoj“ influis la verkistojn. Krome mi jam en alia loko menciis, kiom forte influis la pensado de Laocio la pensadon de la unuaj kristanoj. Sed tiu fonto por la kristanismo inter kristanoj ne estas tiel konata kiel ĝi meritis tion.

(daŭrigota)

16-jarulo kiu impresis la Bulonjan kongreson



En la komencaj jaroj de Esperanto ne malmultaj verkemuloj faris provojn krei poemojn en la nova lingvo. Tio montris fidon al la lingvo kiel taŭga esprimilo de poezio, kvankam la rezultoj estis modestaj.

Sed la tempo de maturiĝo estis proksima. En 1912

aperis la poemaro *Tra l'silento* de Edmond Privat, 23-jara sviso, kiu jam tiam famiĝis inter la esperantistoj kiel oratoro kaj verkisto. Preskaŭ duonjarcenton poste (en antaŭparolo al Junaĝa verkaro de Privat), la hungara Esperanto-verkisto Julio Baghy esprimis sian memoraĵon pri tiu poemaro de Privat, ke ĝi estis "la unua verko, kiu sukcesis sugesti al mi la penson, ke Esperanto estas destinita por la poezio pro sia melodia belsoneco." Baghy citas la unuajn versojn de la poemo *La lasta kiso* kiel pruvon pri tiu "melodia belsoneco":

*Vi kien flugas, papilio',
Tremante kaj rapide?
Jam mortis rozo kaj lilio
Kaj venas frost' perfide.*

Jes ja, Baghy pravas pri la belsoneco, sed tio estas nur la ekstera vesto, pli gravas la senta enhavo de la poezio de Privat. *Lasta kiso* ne temas pri homaj geamantoj, kiuj devas disiĝi portempe, aŭ por ĉiam, kiel oni povus anticipi supozi, sed pri soleca papilio, kiu ĝisvivis la komencon de la vintro kaj baldaŭ mortos doninte lastan kison al "velkinta krizantemo". La temo havas romantikan, tamen serioze trankvilan tonon, eta vivo akceptas morton per kiso – kiel naturan proceson:

*Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larmo
Nun restas en herbejo.*

*Silentas ĉiuj en la nestoj
Kaj svenis bonodoroj.
Jam ne batalos vi kun vespoj*

Pri la floretaj koroj.

*Jen restas nur la kampo vasta
Velkinta krizantemo,
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vin en tremo.*

La poemoj de Privat havas aŭtentikan karakteron ĉefe kiel konvinka esprimo de sinceraj sentoj. Estas evidente, ke la poeto tiel firme sidas en la lingvo, ke estas al li nature uzi ĝin kiel esprimilon de siaj sentoj. La poemoj estas romantikaj kaj svingiĝas inter sentoj de ĝojo kaj malĝojo. Foje ili iel obskure aludas al spertoj, kiujn la poeto plutenas misteraj kaj neklarigitaj al la leganto. La unua strofo de la unua poemo *Ĉu en tombejo?* jam atestas tiun metodon:

*Dum tie vi staris en nigra mantelo
Kaj ĉerkon en foson aŭskultis degliti,
Ĉu brilis la suno? Ĉu bluis ĉielo?
La tombon neniam mi volas viziti.*

Kial la poeto neniam volas viziti la tombon? La sekvantaj ses strofoj tion ne klarigas, sed aldonas pliajn misterojn:

*Sur tombo violojn vi ŝutis kun ploroj,
Kaj iu kun rozoj vin iris imiti.
Mi dankas, amikoj, pro larmoj kaj floroj;
La tombon mi tamen ne volas viziti.*

*Eksidas la vintro, dum falas arĝento,
Sur krucoj granitaj por longe mediti;
Kaj kantas la neĝo pri l' dolĉa silento,
Eĉ nun mi la tombon ne volas viziti.*

*Ĉu flanke tombiĝas knabet' sub kolono?
Ĉu viro maljuna? Ĉu aŭdas vi diri:
"Jen tombo malriĉa, sen nomo, sen ŝtono?"
Ho lasu? Mi tien ne volas aliri.*

*De kiam vi lasis la ĉerkon en tero
Se l' tuta tombej' ne fariĝis pli bela,
Pli gaja, pli riĉa je luma espero,
Ŝin vane mi serĉus en tombo malhela.*

*Ne tie mi serĉis, sed kie ankoraŭ
Ŝi vivas per amo kaj flego donitaj;
Sur litoj suferaj, en ĝojo de l'koroj
En dankaj okuloj, en manoj tenitaj.*

*Kaj tial ekfalu sur tombojn la neĝo,
Aŭ brilu la suno kaj floru la floroj;
Al ter' apartenas nek amo nek preĝo,
Kaj ĉerkon nur venkas vivantaj memoroj.*

La konvinke serioza tono de la poemo tamen kunportas aludojn sufiĉe sugestajn por doni al la poemo statuson de aŭtentiko. Samo validas pli-malpli pri la ceteraj poemoj, la senta esprimo ĉiam sin asertas, ofte per kontrastoj, plej klare en la plej longa poemo Sur vojo de l' vivo, kiu havas du partojn, la unua esprimas amon, esperon kaj ĝojon, la dua perdon kaj malesperon.

La rolo de Privat en la disvolviĝo de Esperanto kiel senta esprimilo trovis sian elmontriĝon en teoria formo en lia verko Esprimo de sentoj en Esperanto (1931). Tiu libreto daŭre plene validas kiel konvinka argumento por la sentesprimaj rimedoj de Esperanto kaj kiel libro de instruo por tiuj, kiuj jam lernis la lingvon, sed deziras ĝin plue studi.

Edmond Privat lernis Esperanton en sia junaĝo kaj mirinde rapide akiris tioman majstrecon pri la lingvo, ke li jam kiel 16-jarulo vekis multan atenton en la Unua Universala Kongreso en Bolonjo-sur-Marco (1905) per sia matura elokventeco kaj oratora stilo.

Krom Esprimo de sentoj liaj plej konataj prozaj verkoj estas Historio de Esperanto kaj Vivo de Zamenhof, ambaŭ klasikaj verkoj laŭ spirito kaj stilo. La spirito estas idealisma, la stilo poezieca.

Se la stilon de Zamenhof karakterizas grandparte ellaborita sintakso kaj la stilon de Kabe senkomplika rekto, la stilon de Privat karakterizas bela harmonio de belsoneco kaj emfaza vortordo. Tamen la diferencaj stiloj de tiuj tri estas ĉiam kristale klaraj kaj samegale efikaj por siaj apartaj celoj.

Edmond Privat mortis en aŭgusto 1962, 73-jara. Liaj personaj rememoroj aperis en la posta jaro sub la titolo Aventuroj de pioniro en redakto de lia samlandano Henri Vatré. La titolo estas aparte taŭga. Privat estis pioniro de Esperanto en Svislando kaj internacia apostolo de la lingvo jam de junaĝo.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 93, 2000)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/privat.html>

El la libro de "Dao De Ĵing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo

DUA PARTO - LA VIVO

79

Se oni repacigas du furiozajn kverelegantojn kaj tamen postrestus ankoraŭ kverelo, kiel tio povus esti bona?

Tial la saĝulo agas laŭ sia devo kaj postulas nenion de aliaj.

Tial tiu, kiu havas VIVON, agas laŭ sia devo; sed tiu, kiu ne havas vivon, agas laŭ sia rajto.

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Tial tiu, kiu havas VIVON, agas laŭ sia devo; sed tiu, kiu ne havas vivon, agas laŭ sia rajto.“

Tiujn frazojn en Ĉinio plejmulte oni komprenas tiel, kiel redonas ilin la traduko de Wang Chongfang:

„La homo kun la VIRTOTO estas nepostulema kiel tenanto de



ŝuldatesta stampo;

La homo sen la Virto estas kalkulema kiel la kolektanto de rentoj.“

Denove mankas frazoj. Mankas eble la plej gravaj frazoj de ĉi tiu teksto! Vd. de Wang Chongfang:

„La Taŭo de la ĉielo, kiu estas partia al neniu, Ĉiam helpas la bonajn homojn.“

Rimarko de Cezar

La unua rimarko de Anniespera memoras min pri mondfama poemo de la poeto Frederiko Ŝiler: „Al la ĝojo“ – konata antaŭ ĉio pro la verva muziko de Beethoven – en kiu fakte ripetiĝas postuloj de Laocio. Mi citas nur la koncernatan tekstparton de la poemo. La poemo mem tradukis Kaloĉaj.

Friederiko Ŝilero

Al la ĝojo

Ĥoro: Ho, toleron, paciencon,
fratoj, por pli bona mond'!
Donos super stela rond'
granda Dio rekompencn!

Ĉu pripagi diojn? Vanto!


Ĉu simili? Bela pen'!

Venu ĝoji kun ĝojanto

la mizero, la ĉagren'.

>>8

Mi vokis spiritojn



La novaĵo pri tiu sensacio ne nur atingis la profesoron. Volker kaj Irene informis la tutan studentan grupon, kiu kompreneble plue dissemis la mesaĝon. Tial verŝajne estis kompreneble, ke jam la venontan matenon alvenis telefonvoko de ĵurnalisto de fama gazeto. Li petis fari intervjumon kun Volker. Volker, kiu ne spertis pri tiaj aferoj, indikis al li, ke prof-ro Brundt verŝajne estus pli bona kandidato por intervjuo.

Sendepende de tio la novaĵo pri Mojo vaste disvastiĝis, tiel ke jam la venontan tagon diversaj gazetoj skribis pri la afero. Grande skribitaj frapfrazoj ornamis la artikolojn. Aperis ankaŭ raportoj pri Volker kaj Irene, eĉ kun fotoj. Neniu sciis, kiu estis respondeca por tiuj publikaĵoj.

Ankaŭ en la kunveno de la loka grupo por la bestoprotektado tiu temo estis diskutata. „Nun mi finfine ricevis bonajn argumentojn“, proklamis la parolanto sur la podio kaj aldonis: „Ni esperas, ke ni nun trovos sufiĉe da subtenantoj kontraŭ tiuj 'transplantaĵ-organizaĵoj'. Ni liberigu ĉiujn bestojn tuj!“

Sekvis granda disputo pri tiu propono. La plejmulto kontraŭis la ideon, kreskigi ĉimpanzojn kiel eblajn organdonantojn. Sed kelkaj konsentis, se oni uzus aliajn bestojn. Por violentaj agadoj pledis nur malmultaj bestoprotektantoj.

Sven prezentis tute alian ideon: „Antaŭ ol decidi tro rapidajn agadojn, ni devas analizi, kial okazis tio. Kiel eblas, ke juna ĉimpanzo tute subite parolas?“. Irene raportis pri la eksterordinara inteligenteco de la ĉimpanza knabo. Ŝi rakontis pri lia sinteno. Precipe la

priskribo de la 'Ching- Chang- Chung'-ludo ege scivoligis ĉiun.

D-ro Zan, kiu ankaŭ partoprenis la kunvenon, petis la parolon:

„Kiel reprezentanto de la IBE mi volas helpi kompreni tion. Nia celo kreskigi beston kun organo taŭga por posta transplantado unue bezonas genteknikon. Ni devas enmeti homajn fontoĉelojn en la bestoembrion. Tiuj ebligas la beston produkti organon, kiun post transplantado la homa ricevanto ne repuŝus. Dum la planado de tiuj eksperimentoj jam ofte aperis kontraŭparoloj de sciencistoj, kiuj avertis pri nedezirataj kromefikoj. Sed neniu kredis ilin.

Ankaŭ mi mem neniam imagis, ke la fontoĉeloj ne nur zorgas pri la kresko de la celata organo sed ankaŭ influas la evoluon de aliaj organoj de la besto. Pro tio la ĉimpanzo ricevis la anatomiajn bazojn por parolado. Certe ankaŭ la cerbo estis tiel influita.“

Ne eblis findiskuti tiun temon. Pro manko da tempo oni decidis daŭrigi la kunvenon en la venonta semajno. Ĉiu nun sciis, ke en la instituto troviĝis minimume unu besto, kiu disponis pri pli da homaj trajtoj ol antaŭe planite.

Sven rememoris la poemon 'La sorĉlernanto' de Johann Wolfgang von Goethe [*], kiun li devis parkerigi en la lernejo. Tie legeblis: 'Mi vokis spiritojn, sed nun mi ne povas liberiĝi de ili'.

[*] *Der Zauberlehrling*


(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo **Erik Tantal**)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>



Vi trafos al ridinda stato nur,
 Se vi perfidos krude al natur'.
 La simpla hom' ne revu pri nobelo,
 Kaj se vi estas nano laŭ statur',
 Ne strebu vi al granda alt-nivelo,
 Sed pensu kun modest' pri via simpla stat'.
 Per pavaj plumoj luksa, laŭ parad',
 Korniko kun fier' en Pava kort' promenis,
 Kaj ĝi imagis jam en tro-memfid',
 Ke pro la pompa vid'
 Konatoj kun ĉagren' al ĝi envion tenis,
 Ke ĝi parenkas nun al pava bela gent'
 Kaj taŭgas la moment'
 Fariĝi en la kort' majesta eminent'.
 Sed baldaŭ krevis for la ambicio stulta.
 La Pavoj pinĉis ĝin per bekoj kun koler'.
 Ne nur sen fremda plum', ĝi restis en mizer'
 Sen propra plum-kovraĵ'; senhelpa kun sufer',
 Ĝi fuĝis en rapid' de prem-atako multa.
 Forkuris tiam ĝi al sia hejma strat',
 Sed la parenca gent' kornikon ne rekonis.
 Per pinĉo kaj bekad' al ĝi turmenton donis.
 Do kia estis rezultat'?
 De la kornikoj ĝi foriris,
 Al Pavoj ne transiris.
 La fablon mi klarigos laŭ konkret'.



Filin' de komercist' Matrona tre sopiris,
 Ŝi revis pri aliĝ' al nobla societ'.
 Kaj dank' al doto ĉirkaŭ miliono,
 Fariĝis ŝi edzino de Barono.
 Sed nova parenkar' riproĉas ŝin
 Pri la malnobla burĝa origin',
 Dum propra famili' — pri la nobel-inklin'.
 Kaj estas nun Matrona en praktiko
 Nek Pavo, nek Korniko.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio

Tusilago

tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio



Antanas Ramonas (1947-1993)

Printempo. Malvarma printempa vento. Tamen finfine ekbrilas la suno. Bonodoras la agro. Tuj en la rubejo apud la kotiĝinta vojo disfaldiĝis flavaj floroj de tusilago. Se vi iros somere, kiam ĉie ĉirkaŭe abundas verdeco, vi entute ne rimarkos polvokovritajn tusilagajn foliojn.

Ŝanĝis la direkton la vento. Ekfrostetis. Eknubiĝis. Malvarma, penetrema pluvo.
 Tusilagoj daŭras flori.

Vespere ekis blizardo kaj ĝi furiozis, blovante malsekan neĝon dum la tuta nokto.

Tusilagaj floroj forestas. Ili kaŝis sin en varmajn arĝentajn peltaĵetojn.

Kaj tiel dum la tuta semajno. Malvarmo, vento, neĝo. Vi kuras pretere, absolute forgesinte, ke en tiu sovaĝloko io floris.

Ree suno. Ekkantis birdoj matene. Per tusilagoj, kvazaŭ per oraj steletoj estas plenŝutita la tuta ĉevojejo. Firmaj, mallongaj tigoj, kovritaj per arĝenta lanugo, flava, amara floro. Vi konstante intencas halti, rigardi, kiel tiu floro aspektas, kia estas la arĝenta lanugo, savanta la floron de akraj printempaj ventoj kaj noktoj. Sed ĉiam vi mankas la tempon.

Kiel malaperas la tusilagaj floroj, vi eĉ ne rimarkas. Ĉiutage pliiĝas ĉiam nova, alloga por la okulo verdeco, kaj via kapo tute turniĝas, kiam ekfloras ĝardenoj kaj padusoj. Kaj jen ĉiuloke ekŝutiĝas leontodoj. Eĉ sur la anoncofosto apud la Urbodoma placo fiere floras, kvazaŭ ia reĝa rozo, brile flava leontodo. Kaj vi eĉ ne memoras la tusilagon! Vi



ne vidis, kiel bruniĝis ĝia floro, kurbiĝis la tigeto, kiel iom post iom ekĝermiĝis fortikaj folioj, kun la sama arĝenta subfoliaĵo, kian havis la printempa tigeto.

Vi marŝas en la somera varmego laŭ la polvanta vojo, memorante nek la printempan malvarmon, nek malfruiĝintajn blizardojn, blovintajn malsekan neĝon, nek florintan kaj obstine malatentintan ĉiun malbonveteron tusilagon.

La jaroj kuras ĉiam pli rapide kaj vi emas iri ĉiam pli lante. Ĉiam pli ofte somere vi haltas ĉe la tusilaga folio – fortika, preteratentata, trinkanta la akvon el la profundaj teraj fontoj. Vi memoras la printempon kaj ĉiam bedaŭras, ke ŝajnis al vi, ke vi mankas tempon.

el la litova lingvo tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

La tradukinto pri la aŭtoro

Antanas Ramonas estas litova prozisto, okupinta sufiĉe notindan lokon en la litova literaturo per siaj rakontoj kaj eseoj. Li studis la anglan lingvon kaj literaturon en Vilnusa Universitato, Litovio. Dum sia mallonga vivo li ne postrestis abundan literaturan heredaĵon, sed liaj kreaĵoj ĉiam atingas la homan koron kaj havas filozofian subsencon. Li estis majstro de etaj detaloj kaj plejmulto de liaj tekstoj estas nostalgiaj kaj elegiaj. Li estis mia amiko dum niaj studjaroj. Mi bonege konas, ke li ne favoris Esperanton, rigardis la internacian lingvon kun ironieto, tamen mi kuraĝis traduki unu el liaj plej mallongaj rakontetoj. Kompreneble, mi ne tute sukcesis transdoni la graciecon de lia teksto, la precizecon de etaj detaloj, sed mi esperas, ke mia forpasinta amiko pardonos mian arbitrecon.

A.V.

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

La unua elegio (Die erste Elegie)

Kiu se mi krius, aŭdus min do el la ordoj de la anĝeloj? Kaj eĉ supozate, ke iu subite prenis min ĉe sia kor': mi svenus de lia pli forta esto. Ĉar la belo estas neni' ol la eko de la teruro, kiun ni ĝuste ankoraŭ eltenas, kaj ni ĝin tiom admiras, ĉar ĝi larĝanime delasas nin neniigi. Ĉia anĝelo estas terura. Kaj tiel mi retenas min kaj forglutas la logan vokon de malluma singult'. Aĥ, kiun do ni kapablas bezoni? Ne anĝelojn, ne homojn, kaj l' eltroviĝemaj animaloj rimarkas jam, ke ni ne tre fidinde hejmas en la mondo interpretata. Restas al ni eble iu arbo sur la deklivo, por ke ni ĉiutage ĝin revidu; restas al ni la strato hieraŭa kaj la malĝustiĝinta fidelo de iu kutimo, al kiu plaĉis ĉe ni, kaj tiel ĝi restis kaj ne iris. Ho kaj la nokto, la nokto, kiam la vento plena je kosma spaco kavigas al ni la vizaĝon -, al kiu ĝi ne restus, la sopirata, milde seniluziiga, kiu nla sola koro kun peno proksimas. Ĉu pli facila ĝi estas al la amantoj? Aĥ, unu per la alia ili nur kovras sian sorton. Ĉu tion vi ankoraŭ ne scias? El la brakoj ĵetu la malplenon aldona al la spacoj aliaj, kiujn ni spiras; eble ke la birdoj la plivastigitan aeron sentas per flugo pli intima.

Ja la printempoj vin certe bezonis. Luj steloj atendis, ke vi ilin sentu. Leviĝis ondo al vi en la pasinto, aŭ, kiam vi preterpasis malferman fenestron, fordonis sin violono. Ĉio tio estis misio. Sed ĉu vi majstris ĝin? Ĉu vi ne estis ĉiam distrata de atendo, kvazaŭ ĉio anoncus amatinon al vi? (Kie vi volas akcepti ŝin, dum ke la grandaj fremdaj pensoj vin vizitadas kaj ofte restas dumnokte.) Se tamen sopirigas vin io, do kantu l'amantojn; ankoraŭ delonge ne sufiĉe senmorta estas ilia fama sento. Tiujn - vi ilin preskaŭ envas - forlasitojn, kiujn vi trovis amantaj tiom pli ol la satigitajn. Komencu ĉiam denove la neniam atingeblan laŭdadon; pensu: sin la heroo daŭrigas, eĉ la pereco estis por li nur preteksto por esti: lia lasta naskiĝo. Sed la amantojn la elĉerpita naturo en sin mem reprenas, kvazaŭ ne estus duoblaj la fortoj, por tion atingi. Ĉu vi sufiĉe memoris al Gaspara Stampo, ke iu knabino, al kiu l'amato foriĝis, ĉe la pli alta ekzemplo de tiu amantino sentu : ke mi iĝu kiel ŝi? Ĉu ne finfine tiuj plej praaj doloroj fariĝu pli fruktodonaj al ni? Ĉu ne venis la tempo, ke ni amante nin liberigu de la amato kaj treme tion sukcesu : kiel la sago sukcesas la ŝnuron, por koncentriĝinte dum la eksalto esti pli ol ĝi mem. Ĉar restado estas nenie.



Voĉoj, voĉoj. Aŭdu, mia koro, kiel alie nur
 aŭdis sanktuloj : ke la vokego ilin
 levu de l' grundo; ili tamen daŭre
 genuis, neebluloj, kaj ne atentis ĝin :
 Tiel ili estis aŭdantaj. Ne ke vi Dian eltenu
 la voĉon, tute ne. Sed blovantaĵon vi aŭdu,
 la seninterrompan mesaĝon, kiu fariĝas el silento.
 Susuras nun de tiuj junaj mortintoj al vi.
 Kie ajn vi eniris, ĉu en preĝejoj
 Romaj kaj Neapolaj ne trankvile alparolis vin ilia sort?"
 Aŭ skribaĵo elstare trudiĝis al vi,
 kiel antaŭ nelonge la tabulo en Sankta Maria
 Formosa.
 Kion de mi ili volas? Mi iom post iom demetu la ŝajnon
 de maljusteco, kiu la puran movon
 de iliaj spiritoj foje iom malhelpas.

Strange ja estas, la teron ne plu priligi,
 ne plu uzi apenaŭ lernitajn kutimojn,
 al rozoj kaj aliaj specife promesaj aĵoj
 la signifon ne doni de homa estonto;
 tio, kio oni estis en manoj senfine timemaj,
 ne plu esti, kaj eĉ la propran nomon
 forlasi kiel rompitan ludilon.
 Strange, ne plu la deziroj deziri. Strange,
 ĉion, kio rilatis, vidi flirtanta tiom libere en spaco.
 Kaj la morteco estas peniga
 kaj plena je postfaro, ke oni post iom
 sentu ioman eternon. - Sed vivantoj faras
 ĉiuj l' eraron, ke ili tro forte distingas.
 Anĝeloj (oni diras) ofte ne scias, ĉu ili iras
 inter vivantoj aŭ inter mortintoj. La fluo ĉiama
 tiregas tra ambaŭ regnoj ĉiujn aĝojn
 kun si kaj ilin supersonas en ambaŭ.

Ili fine ne bezonas nin plu, la fruforirintoj,
 oni malkutimiĝas de la tereco milde, kiel de la mamoj
 patrinaj oni forkreskas. Sed ni, kiuj bezonas
 tiom grandajn sekretojn, el kiuj pro funebro
 tiel ofte fontas feliĉiga progreso -: ĉu povus ni esti sen

ili?

Ĉu vana estas la mito, ke iam plende pro Lino¹
 aŭdaca unua muziko penetris tra seka rigido;
 ke nur en la spaco timigita, el kiu preskaŭ dia junulo
 subite forpaŝis por ĉiam, la malpleneco svingiĝis
 en tiun frekvencon, kiu nun nin ravas, konsolas kaj
 helpas.

de **Rajno Mario RILKO (Rainer Maria Rilke)**

¹. *Lino (Linus), filo de muzino (Urania aŭ Kaliopa).
 Elstara muzikisto, pretendas rivali kun Apolo; la
 indignita dio mortigas lin. Laŭ alia tradicio li estis filo
 de Apolo kaj de Arga princino. Elmetita de sia patrino,
 li estas forvorita de hundoj kaj la patrino mortigita.
 (Laŭ "Le Petit Robert 2", Dictionnaire universel des
 noms propres, Paris 1985)*

Germana originalo: **Rainer Maria Rilke: Duineser
 Elegien.**



Rilko naskiĝis en Prago 1875
 (ĉefurbo de Bohemio kun tiam
 germanlingva urbocentro), kiun
 li definitive forlasis 21-jara por
 loĝi en Munkeno, Berlino kaj
 poste Parizo. Li vojaĝis dum
 sia tuta vivo tra Eŭropo
 (Rusujo, Italujo, Hispanujo,
 Germanujo, Svislando ktp.).
 1921 li ekloĝis en Svisujo, kie li
 mortis pro leŭkemio en 1926.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: http://vlutermano.free.fr/rilko_eleg1.html

Pardonon mi petas

Ĉu vi iam sidis en la vagonaro? Ĉu vi en ĝi
 parolis nian karan lingvon kun viaj (samlandaj)
 geamikoj kaj ĉu vi tiam vidis la atentajn
 vizaĝojn de viaj kunvojaĝantoj ne-
 esperantistoj? Jen iu el ili, kiu diras al najbaro: "estas
 italoj", jen alia, kiu diras: "estas rusoj". Kaj eble vi
 petole tiam faris rimarkojn pri tiuj kunvojaĝantoj, ĉar ili
 ja ne komprenis vin. La pli maljunaj gesamideanoj
 kapskue grumblos: "misuzo de la internacia lingvo".

-- el gazeto "La juna vivo" (1953)

Sed ni gejunuloj kelkfoje devas flankenŝovi la
 seriozecon kaj kial ni hontu pro tio? Tamen povas esti,
 ke mi kaj du amikoj miaj dum la jena okazintaĵo iom
 troigis.

Trioje ni trajnis kaj en nia kupeo krome sidis du
 mezaĝaj virinoj, kaj sinjoro. Ĉi-lasto legis en ĵurnalo
 kaj ŝajne aŭdis nenion. Komence nia konvesacio tuŝis
 diversajn temojn sed iom post iom venis rimarkoj pri la
 nenion-suspektantaj virinoj, interrompitaj de eksplodaj

>>17

Entuta epoko, plena konscio pri la vero (vero ?)

La mensa vivo kaj nia socio per kultaj kanzonoj, kiuj ĉiu konsistas entutan simbolon:

«Ne plu estas da poste» kanzono de Juliette Greco (ŝi estis juna seksa simbolo en la keloj ekzistadismaj de la pariza kvartalo Saint-Germain-des-Près en 1945; en 2019 ŝi plu vivis, en 2020 ne)

https://www.youtube.com/watch?v=_6pAS3gexS8



Tiu kanzono de Guy Béart, fakte de 1960, (en kiu diratas «ne plu estas da poste/en Saint-Germain-des-Près/ ... Nur estas hodiaŭ») estas la filozofa simbolo de la jaroj kvindekaj, la jaroj de la scienco (mi eĉ dirus SCIENCO!) kaj la malespero, tuta moderneco, de la ekzistadisma malespero, Nova Romano, Ionesco, Camus, Samuel Beckett.

Tio povas esti taksata amare inteligenta kaj esence moderna, tia senespera klarvideco, eĉ eble ĝi estas mia, sed krom al la tombejo (nepre! laŭ difino!) aŭ al la memmortigo (ĉe tiuj, kiuj havas iom pli da kuraĝo) al kio tio kondukas?

Krom ĉe tiuj, kiuj forentirkestigis inteligenton kaj klarvidecon – tro suferiga, urĝe trankviligan pilolon! - intelekto, post la senelireja vojo kon ni faros? Tiu klarvideco el kio restas hodiaŭ nur la dogmo de la «ĉitie kaj nun» kaj la «buddhismo» de eŭtanaziismemuloj kaj de la psiĥologie ĝusta laŭ la furora modo.

(Tiam estis la epoko, kiam mi estis infano kaj klarvidulo)

(Sed, mi bedaŭras diri: mi abomenas buddhismon. Mi tre preferas la «Filozofion de la Absurdo», kiu, almenaŭ, estas sento ribela, ne konsentema, kaj ne idealigas la morton, nek ties eternan kaj definitivan maplenon)

DU epokoj! Jen same pri la 70aj

Do alia kanzono, fakte de 1981, kiu estas tuta resumo de l'pasita epoko, Tio estas:

«Li liberas, Maks'» de Hervé Christiani.

<https://www.youtube.com/watch?v=eBuTHDRD9mA>

(«Li metas magion neŝajne, en kion faras li

Li emas rideti, eĉ al stutuloj li.

Plene li ĝuas, ne falas per kaptil'

Ne lasas sin logiĝi per ĉiu reklamil'

Simple li vivas senzorge de

l'mensoj

De l'kaptitaj fiŝoj ĉirkaŭ li en nasoj»)

Tiam estis la epoko libera kaj «hipia» de la jaroj sepdekaj, tiuj de Gébé, Julien Clerc kaj Polnareff.



Rimarkoj:

1° *la timo antaŭ la morto malaperis, kaj la konscio pri vanteco de ĉio ajn. Tro suferigas esti klarvida! Do oni forpremadas, kaj oni ĝuas (kio igas, ke la junuloj, kiuj kredis sin «revoluciuloj» estas pretigontaj la ŝoseon por la nuntempaj burĝoj «liberal-libertariaj»!) Tiel ankaŭ naskiĝis tio, kion mi nomas «la Sekto de la Kultantoj de la Morto».*


2° *Tio estas idealo rava, sed... ve, la mojosaj junuloj, kiuj revumis tiun epokon, ne povis resti tiaj. Tiuj, kiuj plu restis, iĝis maljunuloj, solaj, malfreŝaj, eĉ sekiĝintaj, foje amaraj, aŭ marĝenaj, aŭ mortintaj. La aliaj? Nu, la aliaj, ili normiĝis, ili iĝis burĝoj, tiuj burĝoj, kiujn en Francujo oni nomas pli kaj pli moke «bobo»-oj, riĉaj, bone instalitaj en la socio, kiel en la filmo de Claude Sautet «Koro en Vintro», ili ŝajnigas kredi plu je la samaj valoroj – fraze, sed en la vero ili estas profunde mergitaj en la malo! - tio ebligas al ili kovi pretendon al saĝumi kaj malestimi la popolon! (kiel tiuj morde priskribitaj en la fama libro de François Begaudeau «Rakonto pri cia stulteco» ekzemple).*

3) *Kaj tio estis epoko, kiam oni estis liberaj, kaj ne jam reĝis la totalismaj higienistoj nek la histeriaj kontraŭtumultaj policistoj nuntempaj.*

(Tiam estis la epoko, kiam mi estis junula, kaj mi laboris)

verkis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Post amasaj protestoj de esperantistoj, la japana anglalingva kultura magazino "Esperanto" ne plu nomiĝos "Esperanto". La eldonantoj deklaras, ke ili ankaŭ post la nomŝanĝo "vartos amikan kaj kunlaboreman rilaton" kun Japana Esperanto-Instituto.



La skandalo eksplodis en decembro, kiam iuj japanaj esperantistoj ekdisvastigis asertojn, laŭ kiuj japana firmao volas ŝteli la vorton "Esperanto" kaj malpermesi al esperantistoj libere uzi ĝin. La protestoj temis pri la unua numero de la anglalingva kultura magazino "Esperanto".

Al la protesta kampanjo aliĝis ankaŭ UEA, kaj eĉ Svisa Esperanto-Instituto (SES), kiu diskonigis nefermitan leteron rilate la strebon de la japana eldonejo registri la nomon "Esperanto" por sia periodaĵo. "Ni devas protekti nian kulturan heredaĵon kaj nian kulturan identecon", argumentis SES.

Japana Esperanto-Instituto (JEI) dekomence esperis je bona kunlaboro kun la nova periodaĵo, kiu eĉ proponis aperigi tekstojn en Esperanto, sed post intensaj diskutoj ankaŭ la estraro de JEI aliĝis al la postulo ke la revuo ne uzu la nomon "Esperanto".

Krom organizaĵoj, ankaŭ diversaj individuaj esperantistoj dise en la mondo indignis pro la uzo de la vorto "Esperanto" kaj multaj kolere mesaĝis al la eldonejo. En la retejo Change.org aperis diverslingvaj peticioj kontraŭ la revuo. El tiuj la japanlingva ricevis pli ol 250 subskribojn.

La plej serioza afero estas, ke tro da bruo bazita nur sur supozoj kaj ne sur faktoj flanke de esperantistoj subfosas la reputacion de la Esperantomovado, skribis Ikuko Kitagawa, la prezidanto de JEI, al Libera Folio, lige kun la diversaj kampanjoj kontraŭ la revuo.

La 8-an de februaro JEI diskonigis informon, laŭ kiu la tutmonda esperantistaro atingis la finan celon

de sia kampanjo: la vorto "Esperanto" estos forigita el la titolo de la kultura revuo. Samtempe la eldonantoj refoje asertas, ke ili neniam havis la celon alproprigi al si la vorton "Esperanto":

Ni petis registron de varmarko "Esperanto Culture Magazine" nur en la kampo de eldonaĵoj ene de Japanio. Ni deklaras, ke per tio ni havas nenian intencon limigi eldonagadon de ajna eldonaĵo kun skribo de Esperanto. Ni volas, ke neniu en Japanio eldonu samnomajn eldonaĵojn. Ni nur sekvis la kutimon registri varmarkon por glate irigi komercon, kaj tiu registrado rilatas nur enlande.

La eldonejo Gutenberg Orchestra (GO) daŭre deklaras sian amikan sintenon al JEI:

GO deklaras, ke ĝi kunhavas grandan idealon pri la progresigo de internacia komunikado kaj kultura

interŝanĝo kun JEI, kaj vartos amikan kaj kunlaboreman rilaton kun JEI.

Tamen evidentas, ke la agresema konduto de esperantistoj influis la sintenon de la eldonejo al Esperanto, kaj jam ne klaras, ĉu kaj kial la revuo sub sia nova nomo pretos aperigi materialojn en aŭ pri Esperanto, kiel oni pli frue planis.

Povas esti, ke esperantistoj denove per sia agresema konduto sukcesis konvinki eblan aliancanon, ke pli saĝe estas ne interrilati kun stranguloj. La prezidanto de UEA tamen konsideras la forigon de la vorto "Esperanto" sukceso:

Libera Folio: Ĉu ne estus pli fruktodone provi kunlabori kun la eldonanto, kiu almenaŭ komence sintenis pozitive al Esperanto?

Duncan Charters: – Estis vera venko, kaj la rilatoj restos amikaj. Mi kaj pluraj aliaj pensis kiel vi esprimis vin antaŭ monato, sed multo evoluis post tio. Mi klarigos por niaj membroj se tio utilas kaj interesas kaj respektos niajn japanajn samideanojn. Tamen se vi estus vidinta la pravigon de la angla kiel universala lingvo en la unua numero, vi komprenus la nekongruecon, kiel cetere fine komprenis s-ro Sugatsuke mem.

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2021/02/09/esperantistoj-malaperigis-esperanton/>

Ĝojo de militista gvidanto

La gvidanto aspektis tute kiel ŝtono
Rigardante batalon en sekura loko
Severa luktado kie vivoj vetiĝas
Gvidanto surĉevalo al neniuj buŝparolas

Maltrankvila, laca, senagema li sentiĝas
Dum morto murdas, buĉas kaj libere promenas
Vesperiĝas. Trumpetoj militfinon anoncas
Kaj armeoj en siajn tendarojn revenas.

Sur la bataalkampo miloj da mortigitoj kuŝas
Estas tio loko kie homa vivo malkare vendiĝas
Mortigitoj estas jam poreterne kvietaj
Vunditoj ĝemas, ili sin sentas forgesitaj

Gvidanto kunvenigas sian stabon en la tendego
Pro multaj perdoj stabanoj sentiĝas en funebro
Orgojlita gvidanto diras: Mi ĝoja ja sentiĝis
Batalo okazis ĝuste kiel mi tion antaŭvidis

Mi pensis ke mortigitoj estus multe pli
Sed ne, entute estis nur tridekmiloj da ili

Tirana, 29.08.2016

Portreto de mia maljuniĝinta patro

Pala, oldiĝinta vizaĝo
En faltoj
spuroj de vivo
malhela kaj etĝoja


Kuŝanta
sur la ordinara divano
mi rigardas ties blindajn okulojn
senlumajn
kie ja estas nun tiu reflekso
je saĝeco kaj rara humoro?!

Senagema
sian korpon li movas
per la elĉerpitaj manoj
sian enuan vizaĝon tuŝas
kaj densajn harbuklojn
ekdubas ke lin ankaŭ ili forlasas
en ĉi tiu soleca fino

En la sefo de sia cerbo
estas enŝlosita sperto de riĉa vivo
spirita kaj morala
malfeliĉe la homo
en sia lasta dormo
al neniuj ŝlosilon enmanigas
Nek al edzino, nek al infano

En niaj febraj manoj
nur kelkaj memoraĵoj plurestas
ankaŭ ili doni vane klopodas
plenajn kaj skuigan imaĝon
de homo sen revenvojo.

Lushnjë, aprilo 1986



14>> ridadoj. Ankaŭ la sinjoro fariĝis nia viktimo, sed kiam iu el ni nombris la similecojn, kiujn la viro havis kompare kun Sherlock Holmes, li leviĝis por iri al alia kupeo, kriante en Esperanto: "Bubaĉoj vi estas, oni devus ĵeti vin el la vagonaro!" Honte ni silentis, kaj ĉiu sentis, ke "Sherlock Holmes" fakte estis prava. Sed longan tempon ni tiam ne pripensis la aferon, ĉar kiam unu el la virinoj diris al la alia: "ĉu vi estas certa, ke ni troviĝas en la ĝusta vagonaro?" ni pene kaŝante nian ridon ankaŭ iris al alia kupeo!!

Tamen mi sentas la bezonon peti sinceran pardonon, speciale al la sinjoro, ja povas esti, ke li legas ĉi tiun prozon.....

Amuza rakonto por la "bonan nokton" prenita el malnova gazeto "La juna vivo" (1953)



Lu viro diris: Mi vendis la biciklon je 50 dolaroj, poste mi reaĉetis ĝin je 40 dolarojn, do mi gajnis 10 dolarojn, ĉar krom la biciklo mi havas ankaŭ 10 dolarojn..

Post kelkaj tagoj, la viro vendis sian biciklon je 45 dolarojn, do gajnante 5 dolarojn. Entute la profito, laŭ li, estas 15 dolaroj.

- Haltu iome, diris lia amiko. Ĉu la biciklo ne kostis unue 50 dolaroj, dum nun ĝi valoras 55 dolaroj? Kiel vi diras ke la profito estas 15 dolaroj? Kiam vi vendis ĝin je 50 dolaroj, okazis ja simpla interŝanĝo, sen enspezante aŭ elspezante. Kiam vi aĉetis ĝin je 40 dolaroj kaj vendis poste je 45 dolaroj, vi gajnis 5 dolaroj, jen tiom estas ja la profito!

- Jes, rimarkis iu librorenisto- la viro gajnis 10 dolaroj kiam li vendis la biciklon je 50 dolaroj kaj reaĉetis ĝin je 40 dolaroj. Sed kiam li vendis ĝin je 45 dolaroj, li simple interŝanĝis kiel vi jam menciis tion, sen profito kaj sen perdo. La lasta ago ne tuŝis la antaŭan profiton, do la viro entute havas 10 dolarojn je profito.

Kiel vi eksplikas tion?

Solvo:

Ne ekzistas ununura respondo al la problemo, ĉar ni ne scias do kiom da dolaroj la viro pagis kiam li aĉetis sian biciklon unuafoje. Tio ne estas jam donita.



Astrologio kontraŭ Psikologio - Marto / Fiŝoj

Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « fiŝoj »



Virinoj :

Korpo kaj sano

Ofte bela. La voĉo posedas neklarigeblan ĉarmon. Pli ofte malfortika kaj malgranda. Tamen ŝi havas graciecon; al ŝi plaĉas dancadon.

Ŝi havas malfortikan sanon, ŝi ofte spertas malsanetojn, ellaciĝojn, sed ŝiaj palecoj forpasas tiom rapide kiom ili aperis. Ŝi ne ŝatas agiton nek streson, al ŝi pli plaĉas sterna sin kun libro aŭ aŭskultante muzikon, neagecon bone konvenas al ŝi.

Ege impresebla je la etosoj, ŝi fuĝu la lokojn, kie ŝi sentas sin malbone; laŭ la kompanio ŝi povas tiom bone montri sin inhibita aŭ eksplodema. Tre facilas malvigligi ŝin, maltrankviligi ŝin aŭ taŭzi ŝian malfortikan ekvilibron. Ŝi bezonas kvietan vivon, kun nepre sufiĉa „dozo“ de dormo. Ŝi devas eviti alkoholaĵojn, drogojn kaj okultaj spertoj (kiuj tamen

logas ŝin), ĉar ŝi ne konsciigos pri la netranspasenda limo, kaj ne havos sufiĉe da volo por halti mem. La natura kuracadon tre taŭgas al ŝi.



Kiel ŝi reagas ?

Ŝi estas milda revema, kun naivaj manioj, kaj neantaŭvideblaj kapricoj. Ŝi montras pli da bonvolon ol da efikeco. Ŝi estas simpla, bonulina, facile kaj agrable komunikebla, ŝi neniam provas defii aŭ spiti ; kiam iĝas malbone al ŝi, ŝi eniras en sia protekta « ŝelo », kiu ŝildas ŝin de afekcioj kaj grandaj suferoj kaj kie neniu povas atingi ŝin. Tre intuicia. Eliĝas el ŝi afableco, ĉarmo, rideto, mistero, kaj samtempe estante freŝe natura kaj spontana., kio kaŭzas al ŝi granda sukceso en socia kaj emocia vivo. Estas an ŝi ankaŭ poezieco, kiu incitas unujn kaj logas aliajn, ŝato la tutan vivon al feaĵoj.

Je kio ŝi taŭgas ?

Same kiel la viro tiusigna ŝi ŝatas la bestojn kaj flegas ilin ege bone, ŝi havas kiel sorĉon por akceptigi sin kaj ia « kurento » transpasas inter ili. Ŝi faras sin volonte al ĉiaj taskoj eĉ forpuŝindaj ; kiam ŝi estas supersata pro tio, ŝi haltas : simplas ! Vidatos ŝi prosperi en profesioj, kie oni devas vendi, ĉar ŝi havas la talenton konvinki, eĉ pere de argumentoj, kiuj nenian valoron tenas.

Kiel ŝi amas ?


Ne ekzistas virino pli romantika, ne ekzistas pli amema, nenion pli naturas ĉe ŝi ol ami, oni ne parolu pri feminismo al ŝi, ŝi depostulas nur unu rajton : ami. Ŝi tenas nur unu deziron : renkonti viron, kiu akceptos

ŝian teneron, sin lasos esti amata, eĉ pli, ol li amos.
Tio ne estas pasio, sed strebo al trankvila apudeco.

Se al ŝi mankas ĉian estaĵon por ami kaj dorloti,
ŝi sentas ŝin kiel drogemulo dum manko.

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Kuŝanta ino kun violono (1988)



Kuŝanta ino kun violono, oleo, 1988, 60 x 80 cm

Estis ĉiam mia revo studi ĉe Hochschule für Bildende Künste in Dresden (Akademio por figura arto en Dresdono).

1988 min atingis invito partopreni semajnon pri pentrado de nuduloj. Tiu invito estis distingaĵo, per kiu oni honorigis mian laboron por la populara artkreado (Mi estis gvidinta pentrokursojn por infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj, estis estinta aktiva en la regiona laborgrupo pentrado/grafiko, partoprenis regionajn ekspoziciojn ktp.) Mi estis la sola invitito el la regiono Halle. Mi forte antaŭĝojis!

Mi vojaĝis trajne, pene kunportante multegan pentromaterialon, oleo- kaj akvarelfarbojn, preparitajn kartonojn ĝis la grandeco de 60 cm x 80 cm. La invito inkluzivis senkoste tranoktadon kaj matenmanĝojn en la Gewandhaus-hotelo en Dresdono. Vera frandaĵo por mi!

Sabaton, la 3-an de Julio 1988 mi vizitis en la Albertinum, la galerion pri Novaj Majstroj. En la Speciala Ekspozicio de portretpentristo Vogel von Vogelstein (Birdo de Birdosxtono) mi lernis koni kaj ami mian nunan edzon Manfred Reyher. Li interesigxis pri arto.

Ambaŭ pozitive influis mian pentradon.

London, la 5-an de Julio 1988 en la granda nudpentradosalono de la Akademio por Belarto mi kreigxis la "kuŝantino kun violono". La nin patronanta artisto estis sinjoro Weber. La senvestan virinon li igis kuŝiĝi sur kolorajn tukojn. En la fono maldekstre staris

sendis Helga Plötner el Germanio

granda metala stabla de tiu tipo, kiun ni ĉiuj uzis.

Ĝi estis kovrita per ruĝa tuko. Antaŭ ĝis staris malnova flava seĝo. Sur ĝi troviĝis verda vinbotelo kiel kolora kontrasto. Apud tio sinjoro Weber estis envolvinta grandan kvadron per nigra tuko. Sur ĝi staris kavaĵoplana helblua emajlita kruĉo. Antaŭ ĝi kuŝis bruna violono, korespondanta kun la rondaj formoj de la virina korpo. La tuta aranĝo de formoj kaj koloroj inspiris min. Vidante, ke la aliaj pentristoj pentris abstraktige moderne, mi



pensis: »Atendu, vi aliaj, tion ankaŭ mi kapablas!« Kaj mi plenenergie ekpentregis ekspresionisme!

Mi elektis mian preparitan kartonon en la grandeco de 60 cm x 80 cm. Sur la grandan lignan paletron mi el la farbtuboj elpemis grandajn makulojn da olea farbo: karminon, helbluon, zinkan verdon, oranĝkoloron, flavon, okron, blankon, vermiljonon, violkoloron, ultramaran bluon, brunon kaj nigron.

Sen antaŭdesegno mi svingis la grandan rondan porkharan penikon kun helblua farbo laŭ la korpo de la kuŝantulino, la supran ŝultron, la pelvon, la postajojn. Mi »vidis« la »aeron«, la koloran aŭron ĉirkaŭ la korpo! La peniko energiplene glitis sur la kartono. La reston de la helblua farbo mi foruzis dekstre kaj maldekstre en la supra parto de la bildo, imagita rigardo el ne ekzistanta fenestro.

La spacon inter la du gluteoj mi plenigis per karmino. La reston de tiu farbo mi eluzis por la ruĝaj faltoplenaj tukoj en la fono. Ruĝ - kaj oranĝkoloraj nuancoj ellaboris la ŝtofecon de la tukoj, same iom la kuŝantulinon kaj la tukon dekstre de la kapo kaj antaŭ ŝia mano. La seĝon kaj la korpon mi pentris en flavaj nuancoj, kiuj ankaŭ eklumis en la tuko kovranta la tabureton, precipe dekstre supre kiel areo apud la ruĝa tuko. Kontrastoriĉa vjukaptilo ekestis tiel kvazaŭ lumradio apud la cxiela bluo.

Ne peceton post peceto mi pentris detalojn, ne »de supre suben« laŭkutime, ne sidante - mi pentris starante, superrigardante la tutan bildon, lokigis la farbojn ĉie. La bildelementoj pli kaj pli kunfandiĝis al harmonia tuto. Ĝi estis kontrastoplana kaj kolore

kongrua. Kuraĝe mi metis verdon sur la korpon kaj en la fonon. Kiam mi vidis oleobildon faritan de nia docento sinjoro Weber, mi salivumis kvazaŭ ĉe apetitiga manĝaĵo. Tiom kongrua mi sentis la kolorkombinon!

Mi memoris pri la ekspresionismaj bildoj en galerioj kaj miaj artlibroj.

Pli kaj pli mi ĝojis pentri tiom facilmove. Estis, kvazaŭ mi ebriiĝis pro ekstazo de koloroj!

De la helblua kruĉo jam estis forfalintaj kelkaj flokoj de la emajlo. Ĝi ricevis de mi makulojn en ultramara bluo kaj helajn lumojn. Kiam mi pentris la violonon, sinjoro Weber staris malantaŭ mi kaj ĝojis: »Ĝuste tiel, sinjorino Plöetner, Stravinski!«

Lia konfirmo donis al mi plian energion. Ĉie en la bildo mi pentris. La verdon de la botelo sur la flava seĝo mi vidis ankaŭ kiel verdajn respuguliĝojn kaj verdajn ombrojn sur la seĝo, sur la ina korpo, en la fono kaj sur la planko, miksitaj kun bluo, flavo kaj iom da ruĝo. Sub la kuŝantulino mi pentris la ombrojn en violkoloroj kaj ultramara bluo. La atentokaptilo de la bildo estas la rondaĵoj de la hela supra korp parto, korespondanta kun la flavo super la ŝultro apud la ruĝa tuko kaj la flava seĝo. La rondaĵoj de la nudulino gvidas la rigardon al la rondaĵoj de la violono.

kuraĝa, kohera pentradmaniero.

Tiun semajnon sekvis pliaj bildoj, ekzemple la SEĜO KUN KAFOMUELILO, oleo, 50 cm x 60 cm. Sinjoro Weber estis metinta super la helan dorsapogilon de seĝo ruĝan triangulan tukon tiel, ke ĝia pinto gvidis la okulojn al la kafomuelilo sur la sidloko. Antaŭ la seĝo staris la jam al ni konata helblua emajlita kruĉo. Dekstre apude sube kuŝis la verda botelo. Ankaŭ tiun oleobildon mi kreis en facilanima pentromaniero. Por la fono mi elektis diversajn grizajn nuancojn, trapenetritaj de fajnaj mencioj de helbluo kaj rozkoloro, sur la planko helan flavon kaj iom da verdo.

Postvorto

Kiam mi en miaj ekspozicioj aldonis tiujn ĉi »moderne pentritajn« ekspresionismajn bildojn al miaj pli realismaj bildoj kaj grafikaĵoj, mi kutime rikoltas la laŭdon de miaj pentristaj kolegoj: »Vidu, ŝi scias ankaŭ tiel pentri, eksperimentema ŝi estas! Sed baze ŝi restas fidela al si mem kaj al sia fotorealisma esprimmaniero, kie tamen la harmonio inter enhavo kaj formo arte estas konvinka.«

Sendis **Helga Plöetner** el Germanio

Adulti

tradukis kaj sendis Carmel Mallia el Malto


Ne pro l'vorto, ne pro l'vorto!
Ja ĝi ne timigas min.
Antaŭ ĝi mi ĉiam cedas;
ĝi ne estu eĉ ruin'!

Ĝiaj lipoj: nu koralo
la mielon gutigante;
Nirvan' ĝia ĉe la brusto
min allogas elegante.

Ĝi laŭvole min moketas,
jes pro mia am-obstin'.
Ĝi ne hontas senvestigi
min, por tiel plaĉi sin.

Ne kun vort', en ĉi Edeno
trankvilega, venu vi;
nek per ĝi min apudiĝu
en ĉi muta eŭfori'.

Ho, ho, Evo min stringadas;
ke la vivo malavaru!
Kiam ĉesos la adulto,
por ke ni tuj pentofaru?



Gioele Galea¹



tradukita el la malta de
Carmel Mallia

¹ **Gioele Galea**: *Poeto, membro de solizoleca pastraro, spertanta la belecon de Dia grandeco tra la interna pejzaĝo kaj tra la naturo.*

Signoj (al L.L.Zaamenhof)

verkis Maria Nazaré Laroca el Brazilo

Je l' vojmezo de l' urbaj ĝangaloj
l'anim de l' mond' vagadas
baraktante tra bruega lum'.

Kvankam l'arbareg' ne obskuras,
ĝi vojiradas blinde
laŭ riveroj el fantomoj hidaj:

Perfort' regas, ĉifonas moral';
Senkapigojn barbarajn
oni spektas per televidilo.

Ho Di'! Kien la homaro iras?
Ĉu l' mondanim' fiaskis?
- Ne! - krias idealo:
L' espero pacience obstinas...

Maria Nazaré Laroca
Juiz de Fora. 08/12/2014



Fonto: <https://nazarelaroca.blogspot.com/2014/12/signoj.html>

| | | |
|---|---|---|
| Sur la pentraĵo Strekojn naskas animo. Amo el fabroj. | En la kameno paliĝas la ardaĵo. Paŝoj de cervin'. | Printempan herold' kisis mian vizaĝon! Anim' ĝojegas |
| Tekruĉo fajfas. Sur tablo du te- tasoĵ. Frosta mateno. | Ne diru adiaŭ! Apenaŭ l'tag' komencas ekpezita pro am' | La tero blanka. Ekstere vivas l'glitej'! Larmoj pro ĝojo! |
| Trapikas aŭror' l'arbaron en blua maten' . Spiro de suno! | L' frost' paralizis sensojn. Frostiĝas l'koro sen amon restita. | Malĝojo venis ĉe mi. Ekdonu manon por esti ambaŭ! |
| Flugil' de birdo en sorĉita sunsubir' . Falinta nesto. | Solece paŝas Ŝi sur malseka sablo, kun vento dancas. | Arĝentiĝas ni. Rapide viv' ŝanĝiĝas. L'amo eterna! |



verkis kaj sendis
Ivaniĉka Maĝarova
el Bulgario

PACA HIMNO (EKRA2020)

| | | |
|--|--|--|
| Amarece dolĉas fato – Por epok' sapor'. Tamen, timon kaj malsaton Premas kunlabor'. | Sian lokon nepre trovos Ĉiu en terglob' . Revoj levos kaj elprovos Nin per glorgalop' . | Inspiro kaj Espero Irizas en ĉielo. Por ni la sola celo Por ĉiam restas pac' . |
| Metronom' de bravaj koroj Gvidas nin en marŝ' . Jen armilo nia – floroj, Al milito – kraŝ'. | Inspiro kaj Espero Irizas en ĉielo. Por ni la sola celo Por ĉiam restas pac'. | Sub ĉi standardo arda Kolorparad' aparta Estigos bonan farton, Sen larmoj aŭ grimac' . |
| Inspiro kaj Espero Irizas en ĉielo. Por ni la sola celo Por ĉiam restas pac'. | Sub ĉi standardo arda Kolorparad' aparta En ĉiu mondoparto Defilas tra la plac'. | Espopore konkursajo de Evgenij Georgiev el Karaganda, Kazahio speciala premio pri poezio en EKRA 2020 EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abitus" |
| Sub ĉi standardo arda Kolorparad' aparta De ĉia haŭto startas, Kun arma aŭdac' . | Ni plu vidas oportunon Eĉ en la obskur' , Kaptas je la vost' fortunon Dum obstakla kur' . | |
| Vi rigardu horizonton, Flamas ĝia stri' . Ruĝas per aŭror' estonta Nekonata bril'... | Kreskas de l' avid' kolosa, Grasa arane' , Sed senarmos la ĥaoso; Al militoj – ne! | |

32>> lokon, kie devus troviĝi la por ŝi tre gravaj dokumentoj: ankoraŭ varmeta supo.

sed estis nenio. Ŝtelis, ŝi interne muĝis. Ŝtelis kaj manĝis mian supon! Tiu negra kanajlo! Mi kaj miaj stultaj internaciaj sentoj! Sed fakte kial li ŝtelu esperantaĵojn? Ŝi trankviligis siajn emociojn kaj helposerĉe rigardis ĉirkaŭen.

Sur la breto de la apuda tablo fine ŝi ekvidis kion ŝi ŝajne estis perdinta. Kaj sur tiu tablo staris ŝia

1992
Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Hofburg,
Michaelerkuppel, A-1010 Wien

Estis sunoplena sabata mateno. Aŭtuno prokrastiĝis. Pro sunaj varmetaj tagoj alloge kolektiĝis amase la homoj por pasigi liberan tempon ekster la domo.

Naturo koloriĝas el helaj ĝis malhelaj, sed varmaj koloroj, ekzemple helflava aŭ malhelbruna aŭ malhelruĝa. La falintaj folioj flaviĝas kaj brunigigas, sub viaj piedoj susuras. Tra branĉaro penetriĝas sunradioj varmigante malmultajn restantajn foliojn. Sur branĉaro oni ne vidas nestojn. Nur nubetojn blankajn, krozantaj sur la blua ĉielo.

Sara ellitiĝante el la lito kuris al la proksima fenestro dezirante, ke ŝi vidu kie estas ŝiaj amikoj. Ŝi trankviliĝis vidinte ilin eksteren. Tial ŝi rapidiĝis kun siaj matenaj devigoj. En la kuirejo jam estis preparita matenmanĝo. "Do, ili jam manĝis" ŝi konstatis kontente.

- "Ah, kiel afablaj ili estas" - diris ŝi laŭte preninte sandviĉon per du fingroj kaj kun rida vizaĝmieno ŝmace manĝetis ĝin.

Antaŭ la ligna domo tri ursoj – la plej majunanomata Estro, la mezaĝa Klaŭno kaj la plej juna Urseto. La grandokulo, ĝuis en ĝia matena miela porcio. La plej juna urseto, lekadis ĝian malplenan ujon. La papilioj gaje flirtadis inter ili.

- "Hodiaŭ, mi iros al la urba verda vendoplaco. Kara Estro, mi lasos niajn amikojn al vi. Vi devas prizorgi ilin vartante ĉi-tie. Mi estas revenonta ĝis la kvina posttagmeze. Ĉu enorde amikoj?" diris ŝi akcentante ĉiun vorton. Ŝi gaje svingadis la manon al ili anstataŭ saluti.

Jen nia Sara pave paŝanta tra la urbaj stratoj. En ŝiaj manoj troviĝis plenplenaj du plastaj plektitaj korbetoj. Ŝi estis kontenta ĉar ŝi sukcesis aĉeti ĉion planitan, precipe ke ŝi sukcesis vendi la varojn kunprenitajn de la domo.

- "Estas frue, mi sidiĝu en la kafejokorto, ĉi-tie mi atendos miajn geamikojn Jana kaj Petro" - ekpensis ŝi. Kaj tion ŝi faris.

Subite aperis kelnero. "Ho, vi jam alvenis. Ĉu kiel kutime?" demandis ŝin afable la kelnero.

- "Jes, kiel kutime. Dankon." - ripetis ŝi donacante al li grandan ridon.

Sara ĝue eltrinkis tason da nigra kafo kaj scivole rigardis la ĉirkaŭaĵon. Subite ŝi aŭdis ian kriaĉon. Ŝi streĉite aŭskultis. Ja, vere aŭdiĝis miksita viraj kaj infanaj kriaĉoj. Ŝi mire turnis la kapon dekstren kaj reen maldekstren sed nenio estis vidata. Ŝi estis mirigita, eĉ paniko kaptis ŝin, sed vane. Nenio

suspektinda okazis en ŝia proksimo dum kriaĉoj iĝis pli kaj pli fortaj.

- "Helpu nin". Ŝi klare aŭdis tion, eĉ tiu bruado nun plisoniĝis kiel ia fortatulado. Sara stariĝis maltrankvile faliginte unu el du korbetoj. Oranĝoj kaj kivitaj disjetiĝis al ĉiu flanko.

- "Ho, kion mi faris!" - diris ŝi malkviete. Ŝi kliniĝis preskaŭ genuiĝante por kolekti la falintajn fruktojn. Tiun momenton ŝi ekvidis etendiĝintan manon preta helpi al ŝi..

- "Pardonu, mi helpos vin. Bonvolu sidiĝi je via loko. Kvietiĝu. Nenio stranga okazas." - li diris rigardante ŝin tre zorgeme.

- "Ja, mi maltranviliĝis pro la krioj. Ĉu vi ankaŭ aŭdis ilin?" – demandis lin Sara ankoraŭ tremanta.

- "Krioj...?"

Tiun momenton, forte ekaŭdiĝis krioj. „Ah, nun mi komprenas vin!“ - diris li alpaŝante ĝis la sidloko de Sara.

- "Tuj kriaĉoj vin maltrankviligis! Sed vere ili estas falsaj! Ne zorgu, venu kun mi" – kaj dirante tion li kaptis ŝian manon kaj fortiris ŝin al la proksima pasaĝo de kie venis la fortaj kriaĉoj. Ili kune trapasis la pasaĝon, kiam antaŭ ŝiaj okuloj aperis teamo de surstrata ekzercado fare de la urba fajrobrigadistoj kunlaborantaj kun la infanoj el la apuda Elementa lernejo..

- "Tio estis regula aŭtuna ekzerco, celanta montri kiel savi homojn dum fajrobruligo" - klarigis la nekonata junulo.


La vangoj de Sara ruĝiĝis. - "Ja, pardonu min... ŝi ne povis fini la diraĵon ĉar ŝiaj amikoj, Jana kaj Petro gaje salutis la nekonatulon."

- "Jen, kara amikino. Tiu junulo estas nia bona konato, la bona filo de la amikoj de miaj gepatroj. Pavle estas lia nomo. Li estis loĝinta ĉe miaj parencoj en Montenegro antaŭ kvar jaroj. Pavle, rigardu, tiu bela junulino estas nia bona amikino. Donu al mi viajn manojn" - diris Jana kaptante la manojn de Sara kaj de Pavle..

- "Estos ni la plej bonaj geamikoj, ĉu ne? Unu bela amikeco por la tuta vivo!"

- "Jes, gaje" - diris Sara, kapjesante. Ŝi kaŝe rigardis la bluajn okulojn de Pavle kun kontenta mieno.

(fino de la kvina parto)



Mi cerbumas pri tio, ke al literaturo ĉiu verkanto venas laŭ sia propra maniero. Iuj entute ne alvenas.

Oni diras, ke la plej malfacila literatura ĝenro estas la humuro. Tiel oni parolas en jubileo de la felietonisto, dum enterigo, aŭ en interkonsiliĝo de satiristoj. Kutime en la vivo la humuron neniu serioze konsideras, kaj humoriston – des pli.

Verkis iu el inter viaj kolegoj etvaloran noveleto kaj jam estas verko. Paŝadas li meditema frunto sulkinge, analizas la problemojn de monda literaturo, en la kunvenoj de prozistoj novajn amerikojn malkovras. Kaj humoristo...? Kio estas humoristo? Nur humoristo. Kaj ĉio!

– Mi laboris tutan semajnon, ĝis finis verkon, – foje mi diris al redaktoro.

– Kaj kion vi verkis? Ion seriozan aŭ humuraĵon? – demandis tiu.

– Ne, – ekhontis mi, – satiran rakonton finverkis. Kaj iĝis al mi ege honte, ke mi okupiĝas pri tiaj bagatelaĵoj.

Li ekridetis kaj okulumante ekrigardis min. Poste iom streĉinte atendis kaj fine diris:

– Vi skribu ion pri Esperanto...

La temo estis malfacila. Por ke pli facile mi orientiĝu, mi ĉiujn homojn dividis je du partoj: "esperantistoj" kaj "ne". Kaj ĉio tuj okupis siajn lokojn. Post kelkaj tagoj la rakonto estis finita, tamen pro ne klaraj kaŭzoj la manuskripto ien perdiĝis...

...

Unu belan tagon mi promenadis en urba parko kaj ne atendite kaptis min je mano iu barbohava junulo kaj ekis.

– Ni sidiĝu, ni havos longan interparolon.

Mi ĉirkaŭrigardis kaj konvinkiĝinte, ke ankoraŭ preteriras homoj, ni eksidis sur apude situantan benkon.

– Do, – sulkiĝis la barbulo. – Ĉu vi en aŭtobuso restigis manuskripton?

– Ĉu mi?

– Ne elturniĝu...! – riproĉis tiu.

– Nu, eble restigis... – dubis mi.

– Do vi restigis aŭ ne? – ne lasis li min.

– Eble... mi ne memoras.

– Ĉu vi intence restigis ĝin?

– Ne, pro kio...? – mi komencis percepti la aferon.

– Konfesu vi, – minace ekmoviĝis la barbulo, – ĉu ĉe vi ĉiuj "hejmas", ĉu vi saĝas?

– Kiel...? – ne komprenis mi.

– Ĉu vi konsideras vin prudenta? – li atakis min plu.

Mi ruĝiĝis, ekstaris kaj ne cedis:

– Kion vi volas de mi?

La Barbulo eksaltis kaj ekkriis:

– Do vi verkis tiun rakonton "La lasta esperantisto"...?

Jen li..., kaptu ni! – subite proksime

ekaŭdiĝis ekkrio. Barboza junulo ekkaŭris, kaptis min je mano kaj tiris min en arbustaron. Post kiam perpieda tretado silentiĝis, la barbulo per unu mano tenanta ĉe sia vizaĝo klinigitan arbustan branĉon volis ion diri. Sed subite de urba flanko ekaŭdiĝis la hunda bojo.

– Malbonas, – siblis la barbulo.

– Kio malbonas? – demandis mi.

– Kun la hundoj persekutas min!

– Kion vi faros? – ekinteresiĝis mi.

Barbulo lasis la arbustan branĉon, ekstaris, frotis sian frunto kaj diris:

– Vidu, mi trovis en aŭtobuso vian rakonton, ĝin legis, ĝi plaĉis al mi kaj mi portis ĝin al redaktoro de urba gazeto. Tiu volonte konsentis ĝin publikigi.

– Kion?! – kriis mi, – Vi diras, ke oni publikigis ĝin?!

– Publikigis, – mansvingis la barbulo, kaj denove kaptis arbustan branĉon. – Nur mian familinomon sub via rakonto li metis. – La Barbulo levis per sulkoj kovritan vizaĝon, riproĉe ekrigardis min kaj forturniĝis.

– Malbonas, – konsentis mi.

– C–ss–s, – la barbulo silentigis min, metinte fingron ĉe lipoj. – Mia edzino iras...

– Ĉu tiu en ruĝa jupo?

– Jes, – ekĝemis la barbulo... kaj subite ekmoviĝis: – Estu homo, postkuru ŝin kaj ĉion klarigu. Trovis li, vi diru, la manuskripton, rememoris la aŭtoron kaj portis, vi diru, al redaktoro de urba gazeto. Mi, diru vi, estas tiu aŭtoro. Ne mi, sed vi. Ĉu komprenas vi? Ĉar ŝi, kiam tralegis en la gazeto vian rakonton kun mia familinomo, min en psikiatrian malsanulejon veturigis... Tra la fenestro mi fuĝis...

Tiutempe laŭ la parka aleo geinfanoj posttiris kaptitan hundon.

– Ni iru kune al via edzino, – ekridis mi. – Vidu vi, ne vin la hundo, sed infanoj la hundon kaptadis...

Li ekridetis kaj turnante la okulojn, alrigardis min.

– Ĉu vi serioze...? Ni iru...

...

Se priskribita de mi evento ŝajnas al vi bagatela kaj ridinda, kaj homaj zorgoj... ne indaj por la atento, ni ne forgesu, ke tio ĉi povus okazi ankaŭ al vi.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



Naŭjaraĝa Annemarie estas granda katamanto kaj havas multajn plenigitajn pluŝkatojn. Sed tio ne sufiĉis plu al ŝi. Por ŝia naŭa naskiĝtago, ŝi petis al sia patrino doni al ŝi veran katon. Ŝia panjo promesis: "Tiam mi donos al vi specialan katon." "Ĉu speciala kato? Nu, mi certas, ke ĝi estas vera kato." Atendis Annemarie, sed ĝi estis mansignanta kato. Annemarie estis senluziigita, sed ĉar ŝi estis "kato, kiu alvokas feliĉon", ŝi ekiris por akiri vivantan katon. Ĉu ŝi povis akiri katon?

(daŭrigata)

Sed ĉu de tie oni povas ricevi katon? Simple kunpreni iun, kiun oni ie trovis, sed fakte oni povas forkapti ĝin. Kaj tiam ĝi certe estus propraĵo al iu, kiu tiam estus trista, kiam la kato neniam revenus – ne, tio tute ne estas ebla.

Sed katon ja oni povas ricevi de la bestoazilo! Tie certe oni ĝojas pri tio, kaj la kato ankaŭ estos feliĉa, se ĝi ricevos belan hejmon kaj amindan mastrineton! Ĉi tio estas!

Annemarie iras al la telefono. Ŝi jam estas granda. Naŭ jarojn! Ŝi bone povas legi, skribi kaj kalkuli. Tuj ŝi trovas la numeron de la informsekcio en la telefonlibro.

"Bonvolu doni al mi la adreson de bestoazilo!"

En la urbo ekzistas nur unu bestoazilo kaj Annemarie notas la adreson.

Tiam ŝi preparas sin por foriri. Iom da mono certe ŝi bezonos por la tramo aŭ la buso. Pene ŝi elkaptas kelkajn monerojn el ŝia ŝparporko.

Tiam ŝi fermas sian anorakon, prenas la feliĉokaton kaj enĵetas ĝin de supre en la jako, prenas ŝian ŝlosilon kaj forlasas la domon.

Ŝi transdandiĝas, kiel oni veturas al bestoazilo. Ŝi devas aĉeti multekostan bileton – du eŭroj ses dek centoj – ĉar ŝi devas ŝanĝi tramon. Daŭras longe. Iam kaj iam ŝi sentas, kiel la feliĉokato svingas la manon en la anorako.

Tiam finfine ŝi staras antaŭ la bestoazilo. En la akceptejo sidas sinjorino antaŭ granda vitrofenestro, tra kiu Annemarie vidas multajn kaŭrantajn, ludantajn, sidantajn aŭ kuŝantajn katojn. Sopire Annemarie alrigardas.

"Kion vi volas, mia infano?" demandas la sinjorino kaj rigardas al ŝia brakhorloĝo.

"Bonan tagon!" diras Annemarie. "Mi venis por preni katon."

Ŝi denove rigardas tra la fenestro al la katoj. Pronto bedaŭrinde ne ĉeestas.

Mi ankaŭ prenas katinon, pensas Annemarie. – La malgranda griza tie – mi nomigos ŝin Susi, Sunjo ...

"Do, jes – sed tiam vi deva reveni kune kun via patrino. Sed nun ĉe ni estas laborfino", respondas la sinjorino kaj nun ŝi rigardas al la murhorloĝo, kiu montras la dektrian.

"Kaj bonvolu diri al ŝi, ke ni bezonas la legitimilon. Kaj kvindek eŭrojn kiel gardopago ŝi devas bonvolu tuj ankaŭ kunporti."

Annemarie rigardas afliktite al Susi.

"Ĉu vi komprenis, mia infano? Legitimilon, kaj kvindek eŭrojn!"

La bestoazilo jam longe restis for malantaŭ Annemarie. Ŝi ĉiam pluiras laŭlonge de la strato... Dometoj, malgrandaj ĝardenoj... Nigrablanka kato glitrapidas trans la straton kaj malaperas malantaŭ ligustra heĝo. Annemarie vidas blankan paperon blinki ĉe la latbarilopordo kaj transiras. "Junaj katidoj", estas skribita per dika nigra skribo sur la papereto.

Annemarie prenas la pordoklinkon. La pordo estas malfermita. Ŝi elprenas ŝian monon kaj nombras ĝin. Sufiĉas pene apenaŭ por la reveturo.

"Do, tiam mi piediros hejmen!"

Sed – kiel povus sufiĉi tio? Se kato en la bestoazilo jam kostas kvindek eŭron!

"Ĉu malgraŭ tio, mi devus eniri?"

Subite svingas la feliĉokato en la anorako.

"Mi simple riskas!" Kaj Annemarie subenpremas la pordoklinkon kaj eniras. Al la dompordo ŝi sonorigas. Viro malfermas la pordon.

"Bonan tagon!" diras Annemarie. "Mi venas kaŭze de kato!"

"Nu do, eniru!" diras la viro, kaj Annemarie sekvas lin. En la kuirejo sidas la mastrino kaj trikas. En angulo estas metita kovrilo, sur kiu malgrandaj katetoj ĉirkaŭludas. Unu nigra kun blankaj piedetoj kaj blanka savtuketo ĉeestas!

"Pronto!"

"Bonan tagon!" Annemarie ne povas plue eldiri ion.

La feliĉokato sub la anorako komencas svingi denove. Tre energie, ŝajnas al Annemarie. Ŝi elmetas la feliĉokaton. La feliĉokato plusvingas. Ĉu ĝi alsvingas la feliĉon?


"Ha Ha Ha! Kion do vi jen havas? Rigardu patrino!"

La mastrino rigardas kaj ankaŭ ŝi ridas.

"Ĉu vi volas interŝanĝi?" demandas la viro.

Annemarie kapjesas.





"Nu, do, tiam elserĉu iun!"

Annemarie metas Pronton en ŝian anorakon. Kiel varma li estas! La mastrino kolektas kelkajn bongustaĵojn.

"Ĉi tiujn li plejvolonte manĝas!"

Hejme intertempe ĉiuj estas en grandega ekscito. Kie estas Annemarie? Komence la patrino estis ne tiom malkvieta – certe Annemarie estas ĉe Kati, kelkfoje ili ambaŭ kunludas post la lernejo. Sed nun ŝi devas jam veni!

Sed ĉe Kati Annemarie ne estas, kiel la patrino ekscias telefone. Kaj ankaŭ ĝenerale nenie – neniu el la amikinoj scias, kie ŝi estas. Ankaŭ de la infanvartejo oni ne scias ion.

"Ŝi volus, verŝajne, iri hejmen" estas la sola respondo, kiun oni povas aŭdi.

La patrino de Annemarie ekpanikiĝas. La patro estas alarmigata, kaj ambaŭ treege serĉas je ĉiu ludplaco, je ĉiu loko, je kie Annemarie troviĝus eble.

Nenie!

Oni devas informi la policon! Ĉiuj estas demandataj, kaj multaj helpas je la serĉado.

"Kiel la infano estis vestita lastfoje? Ruĝa anorako kaj blua pantalono? ... Kaj tiel plu kaj tiel plu... Ĉio iradas kiel priskribite. Iu volas vidi Annemarien, kiam ŝi eniris en la tramon! Ĉu Sole? Ĉu kunestis iu ku ŝi? Kaj kiu?" Sed oni ne povas sciigi ion.

La patro kaj la patrino sidas en la ĉambro de Annemarie. Nun ili povas nur atendi. Antaŭ ili sur la tablo kuŝas iliaj poŝtelefonoj kaj la poŝhorloĝo de la patro. Ĉiumomente ĝi povas sonori, sed ne sonoras. Ŝajnas, kvazaŭ la tempo estas haltinta, sed la fajna mallaŭta tiktakado de la malgranda ora horloĝo montras senkompatate, ke jam estas la deksepa. Komencas malheliĝi jam.

"Nun jam oni serĉas unu horon per la hundoj", flustras la patrino.

Ŝi rigardas al la pluŝkatoj, kiuj silente sidas sur la litrando.

"Aĥ, se ili povus paroli!"

Sed la pluŝkatoj silentas kaj alrigardas ŝin per

grandaj riproĉplenaj okuloj. La patro prenas ŝian manon.

"Ili trovas ŝin! Tutcerte! Ŝi revenos!"

Kaj li aldiras kulpokonscie: "Ni estus donacinta al ŝi do poŝtelefonon..."

Tio estis diskutita antaŭ la naskiĝtago, sed Annemarie estas ankoraŭ tro malgranda, oni opiniis.

"Katon!! Katon ni estus donacinta al ŝi!!" La patrino laŭte ekplorĝemas. La patro karesas ŝian manon.

Tiel ili kunsidas kaj atendas. Ĉiam kaj ĉiam la patrino transrigardas al la pluŝaj bestoj, kiujn ŝi spektas kaŭze de siaj larmantaj okuloj iom post iom ankoraŭ nur kiel buntaj makuloj. Malgraŭe subite io frapas al ŝi. Ŝi ĉirkaŭrigardas en la ĉambro, vidas sur la naskiĝtablon.

"Kie do estas la feliĉokato?"

Esperradioj falas en ŝian koron. Ŝi prenas la manon de sia edzo.

"Ŝi revenos! Mi scias! Ŝi revenos!"

Trankvileco... Ili atendas ...

Subite – brueto! Ĉu turniĝas ŝlosilo en la dompordoseruro? Aŭdiĝas malgrandetaj piedpaŝoj? Mallaŭte, tute mallaŭte – suprenvenas ili la ŝtuparon? Ili sidas dum kelkaj sekundoj kvazaŭ rigidiĝante.

Tiam la patrino rapidegas al la pordo, ŝirmalfermas ĝin. Antaŭ la pordo staras Annemarie en ŝia ruĝa anorako.

La patrino prenegas ŝian filinon en siajn brakojn, karesas kaj kisas ŝin.

"Annemanjo!"

Annemarie rezistas. "Ne tiel forte, panjo! Vi ja disprenos Pronton!"

Ŝi foriĝas, malfermas la anorakon iomete, eltiras Pronton kaj tenas lin feliĉradiante antaŭ la vizaĝojn de ŝiaj gepatroj.

verkita kaj esperantigita de
Margarate Bastian el Germanio



Ĉiam ekscitas nin, entuziasmoj pri lingvoj, eltrovi librojn de konataj aŭtoroj, kiuj temas pri Esperanto. Antaŭ kelkaj tagoj mi tiel entuziasmiĝis, kiam mi rimarkis libron titolitan “Esperanto ve Çokdilli Bir Gelecek” (Esperanto kaj Plurlingva Estonteco) de Umberto Eco en mia loka



Umberto Eco

librovendejo. Mi ĉiam

fervoris pri liaj romanoj, sed mi ne sciis, ke li verkis libron sur la temo de Esperanto. Do mi scivolemis, aĉetis, kaj legis la tutan libron dum la sama tago; kaj mi devas agnoski, ke ĝi estis unu el la plej interesaj libroj, kiujn mi iam legis pri konstruitaj lingvoj. Per de tiu ĉi recenzo, mi intencas diskonigi tiun ĉi libron al pli multe da

samideanoj. La libro konsistas el du partoj. La unua parto estas interparolado inter semiotikisto kaj fama verkisto Umberto Eco, kaj du esperantistoj; István Ertl kaj François Lo Jacomo en la jaro 1998 ĉe la Universala Esperanto-Asocio. En tiu ĉi parto, la parolantoj diskutas la estontecon de Esperanto kaj ĝian pozicion inter aliaj lingvoj en epoko, kie komunikado tre rapide voluas kaj ŝanĝiĝas. La originala titolo de la interparolado estas, “L'espéranto et le plurilinguisme de l'avenir” (Esperanto kaj la Plurlingveco de la Estonteco) kaj ĝi senkoste haveblas ĉe retarkivoj en la franca lingvo.

La temoj diskutitaj dum la interparolado estas ĉiaspecaj. Ili temas pli pri sociologio kaj filozofio ol lingvistiko; kiel, la politikoj pri instruado de lingvoj de ŝtatoj, kiel socioj formas lingvojn en la nuntempa mondo, la disiĝo de la lingvoj de la landoj establitaj tiutempe kaj la rolo de Esperanto en ĉio ĉi. La partoj, en kiuj estas menciitaj la gramatikaj trajtoj de Esperanto, konsistigas nur malgrandan parton de la konversacio. Kvankam ekzistas ankaŭ multaj verkoj, kiuj temas pri la lingvaj perspektivoj de Esperanto, ĉi tie la pridiskutita temo estas plejparte pri kiel Esperanto —kiel movado kaj lingvo— povas helpi la homaron plurmaniere disvolviĝi kaj atingi siajn celojn. Tiu ĉi distingas la interparoladon kiel libro de plej multaj aliaj libroj, kiujn mi antaŭe legis temante pri Esperanto.

Ĉar Eco ne estas esperantisto mem, (Kvankam li

sendube scias multon pri la lingvo, li ne nomas sin esperantisto dum la interparolado) li ofte demandas al Lo Jacomo kaj Ertl pri diversaj lingvaj kaj kulturaj trajtoj de Esperanto tra la interparolado. Indas rimarkigi tion, ke nenio de tiuj demandoj intencas laŭdi aŭ kritiki Esperanton. Vi rimarkos la bonvolon kaj scivolemon en ĉiuj liaj demandoj. Ambaŭ Lo Jacomo kaj Ertl respondas al ili kaj subtenas iliajn respondojn per ekzemploj, kaj tiel la konversacio daŭras.

La dua parto, “Uluslararası Yardımcı Diller” (Internaciaj Helplingvoj) temas pri la aliaj konstruitaj lingvoj kaj la pozicio de Esperanto inter ili. Tiu ĉi parto estas prunteprenita de libro de Eco titolita “La Ricerca della Lingua Perfetta nella Cultura Europea” (La Serĉo pri la Perfekta Lingvo en Eŭropa Kulturo) kie Eco esprimas malkaŝe la teoriajn kontraŭdirojn al Esperanto kaj aliaj helplingvoj, la limojn kaj malfacilaĵojn de ĉi tiuj lingvoj, kaj la obstaklojn, kiujn ili povas alfronti en la hodiaŭa mondo. Se vi interesiĝas pri lingvistiko aŭ aliaj konstruitaj lingvoj; mi certas, ke vi trovos tiun ĉi parton tre interesan, ĉar ĝi enhavas multe da ekzemploj kaj komparoj de diversaj lingvoj.

Ambaŭ partoj tre bone montras la eblecon de plurlingva socio en kiu Esperanto estas vaste parolanta, kaj precipe la unua parto multe pensigas la leganton pri la estonteco de Esperanto en reala uzado tra la mondo. Fine, mi invitas ĉiujn esperantistojn legi tiun ĉi libron kaj volas konkludi mian recenzon




per la jenaj citaĵoj de Eco:

“La homoj daŭre perceptas Esperanton kiel propono de ilo. Ili scias nenion pri la idea impeto, kiu ĝin vivigas.”

“Mi studis la gramatikon de Esperanto [...] kaj mi konstatis ke ĝi estas lingvo konstruita kun inteligenteco kaj kiu havas tre belan historion.”

recenzis kaj sendis **Ali Çagan Kaya** el Turkio

Ŝercoj



KION MI FARU?

Baniko plendas: Ĉiuj ĉiam diras al mi tion, kion mi devas fari!

Kruko: Malatentu ilin! Estu via propra ĉefo! Ne kliniĝu antaŭ la aliaj!
Baniko silentas.

Kruko: Ĉu vi aŭskultas?

Baniko: Ja, vi diras al mi tion, kion mi devas fari...
* * *

PLENA DISPUTO

Kruko kaj Jozefino disopinias pri iu domafero, kaj la diskuto iom varmiĝas.

Kruko: Ĉu ĉi tiu malakordo vere devos pligrangiĝi en plenan disputon?

Jozefino: Kompreneble ke ne, karuĉjo.

Kruko: Ha, bone....

Jozefino: Mi estas tute preta trankvile atendi ĝis vi komprenos, ke vi estas komplete freneza!
* * *

TRANKVILA DUM KRIZO

Kruko parolas al siaj gepatroj: Vi ambaŭ estas bonŝancaj, ke vi ankoraŭ havas unu la alian.

Avino Krukegino: Jes, vi pravas, Kruko.

Avo Krukego: Sed mi estas la pli bonŝanca. Krukegino estas tiu, kiu ĉiam restas klarmensa kaj trankvila dum ĉiu krizo.

Kruko: Ĉu vere?

Avino Krukegino: Jes ja. Kaj Krukego estas ĝenerale tiu, kiu kaŭzas la krizojn!

* * *

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



Krucvortenigmo



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Ili protektas sendaĵojn; 6. Riĉeco sen gvido kiel ___ sen brido (Zamenhof); 7. Simbolo por iridio je kemio; 8. Kontraŭo de ne; 9. Rilata al feo; 11. Mallongigo de Eŭropa Unio; 12. ___ sen gvido kiel ĉevalo sen brido (Zamenhof); 14. Japania industria havenurbo.


VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Perdis la vivon per akcidenta morto; 2. Unua duono de avio; 3. Konjunkcio; 4. Eco de oleaĵoj; 5. Profeto, postirinto de Moseo; 6. Sekreta interkonsentita skribsignaro; 10. Kaŭzanta malagrablan impreson; 13. Prefikso signifanta, ke la procezo komenciĝas subite.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)



Ho, HOMARO! Vivante mi
kun Vi multegon vidis
Deduktante ĉion, al Vi
ion diri decidis!

Aŭskultu min Vi, kara
kaj atentu je la tem',
Dediĉitan al Vi ĉiuj
kaj ankaŭ al mi mem.

Mi ne bezonas la gloron,
Laŭdvortojn, titolon.
Mi nur volas diskonigi
Vaste mian korvolon!

Mi ne mesaĝas al unu
ajna popol' aŭ car'.
Mi mesaĝas al Vi ĉiuj
tiel nomata Homar'!

Oni nomas nin "La Homo" –
plej saĝa sur la Ter',
Senĉese ni devas beni
tio estas pura ver'.

Unu el ni estas judo
Kaj alia islaman',
Kaj jen, la tria kristano
Sed la sama koro, man'.

Ĉiuj havas la komunajn
Estintulojn iamajn,
Kaj la saman ja lulkorbon
Kaj la gepatrojn samajn.

Ĉiuj kunagnoskas certe
Tiujn Adamon, Evon,
Sed militas inter si mem
Forgesinte ĉefdevon!

Mia celo: tiun devon
Al HOMAR' memori!
Kaj cetera celo estas:
Malamon tutforigi!



(daŭrigota)

“Lernejo sen malsukceso en la ekzameno” de Dr. Kudo Nobuo

verkis kaj sendis Kacu Matoba el Japanio

Dr. Nobuo Kudo naskiĝis en Gubernio Akita, Japanio en 1945. Post li lernis psikiatron en Hirosaki kaj Osaka Universitato, li studis en la medicinaj fakultatoj en Suda Metodisma kaj Baylor Universitatoj en Usono. Japana medicinisto, psikiatro, doktoro pri medicino psikiatro. Li estas bone konata kiel kristana psikiatro en evangeliaj eklezioj. Ankaŭ li havas la kunvenojn, kie li studas la eklezian aferon kun pastroj. Li estis ĉefkuracisto de psikiatrio en Jodogaŭa Kristana Hospitalo. Li laboris kiel la profesoro de Lutera Gakuin Universitato (sociala bono), kaj Heian Virina Universitato (Honora profesoro).

La infanoj, kiu ludis hieraŭ kotmakulite en parko, iras al lernejo ruĝiĝiante siajn vizaĝojn. Ĉiuj vizaĝoj streĉiĝas kaj siaj okuloj brilas. Junaj patrinoj ankaŭ vestas bele. La tago de la ceremonio por novaj lernantoj ŝajnas esti la plej bonega tago. En la haltejo de buso, ni vidas la scenon kun duonfermitaj okuloj kaj volas alvoĉi "Hej, kuraĝon!" ĉar la infanoj ŝajnas esti la espero mem de nia vivo.

Nun, vidante tiajn scenojn, mi ne estas tre trankvila. Ĉar ĝi estas iel netrankvila pri la nuna lernejo, kiu povas aŭ ne povas komunikadi al ĉiuj lernantoj ĝojon vivi kaj ilian unikecon. La regula vizitado al lernejo kontraŭe perdigas la memfidon al lernantoj kaj faras ilin tute vane, mi antaŭtimas.

Pasintan tagon mi legis la artikolon skribita de Sino Ŭatanabe Kazuko, Prezidanto de Notre Dame Seishin Universitato en Okayama. La resumo estas ĝenerale tia: Kiam la prezidanto venis al usono por

prelego, ŝi aŭdis la preparolon de Dr. Glasser, gvidanto de la gejunulaj edukadoj en Kalifornio kaj la verkinto de "Lernejo sen malsukceso en la ekzameno".

La doktoro diris, ke hodiaŭa usona lernejo donas negativan memkoncepton al lernantoj. Tiu ĉi estas intima kun junula huliganeco. Lastatempe usonaj junuloj televidas dum kelkhoraj kutime, tamen la mondo surekranigita sur ĝi havas sonĝon, ĝojon, kaj estas la loko "kie ĉiuj iras bone". Sed, veninte al lernejo, ili vidas tute diferencon mondon. La gepatroj kaj instruistoj enpelas lernantojn senrilate kun memkapablo en la plurajn golojn de la poento, enlasiĝo kaj dungaĝo. Se la lernanto ne povas atingi ĝis la golo, ili senindulge etikedas "malsukceso"-n, kaj vokas malsuperulon aŭ malsukcesulon al la lernanto. Rezulte, junuloj enfalas en mizeron, kaj la lernejo faras nur terurejo kaj malagrablejo por ili.

Al sekso, perforto, alkoholaĵo, kaj opiaĵo inklina klopodado returni la negativan memkoncepton farita de lernejo. La junuloj provas revigligi memfidon rompita en lernejo en homsvarmejo, kaj forpeli la ĉagrenon de si eĉ unu momenton per alkoholaĵo kaj opiaĵo.

Do Dr. Glasser diras, "Por plibonigi usonon kaj reveni ilin al lernejo de homsvarmejo unue lernejo devas ŝanĝiĝi al la loko havigi al ili memfidon. Puni ilin estas vane. La lernejo nepre devas revizii la antaŭan intencon de golo, kaj reakiri la intenco de rolo. Kaj la lernejo ne estas la loko prostitui la scikonon aŭ



konduki por sukcesa kariero tra enlasiĝo en pli altan lernejon, sed estas la loko, kie ĉiu kreskas al la homo. La plej graveco por kreski estas la vera kaj pozitiva memfido pri propra valoro.

Se la lernanto enfalus en mizeron kaj perdigus la memfidon vivi, la etikedo de "malsukceso" ne devus doni al junulo, sed al la lernejo kiu malsukcesis akirigi memfidon al lernanto".

La enhavo estas tre grava. La golo estas unu atinginda celo, sed la rolo estas memkonfirmo "Kio mi estas?" kaj "Kio estas mia ekzistkialo en la socio?". Kaj la rolo donas al persono memfidon kaj ian fieron.

Por plue klarigi la punkton, mi volas citi la rakonton "Tora-san". Laŭ la reĝisoro Yamada Yoĵi, la fama konata de kino "Krepuska Samurajo" (vidu Turka Stelo, #55, 5.2020). Acumi Kiyosi, la ĉefaktoro, estis problema infano en lia elementa lernejo. Tiam li sidiĝis en la plej malantaŭa seĝo kaj vidis ĉirkaŭen maldiligente aŭ la vizaĝojn de siaj geamikoj, kiuj estis diligente studentaj. Li pasigis la tedan lernotempon. Tamen li havis sian veran rolon en la lernado. Nome, kelkfoje estis ripoztempo en la eĉ streĉiĝita lernado. Tiam la aliaj lernantoj fikse rigardis lin, kaj la knabo Acumi ridetis kvazaŭ la tempo estis lia vico. Sekve ili eksplodis lian ridon. Ili ne scias kial, sed ĉiuj revigliĝis.

La reĝisoro Yamada diras "Mi pensas s-ro Acumi estas unuspeca eminentulo. Li estas rara fama aktoro. Mi ne scias alian personon, kiu povas tiel diri admirinde, simple, bele, tenere kaj reale la proprajn spertojn kaj la memorojn pri siaj renkontaj homoj. De lia studenta jaro kaj ankaŭ post kresko, s-ro Acumi Kiyosi daŭre plenumas la mision de tia rolo en la socio. La rolo estas unuvorte la aktoro. Ludi la rolon "Tora-san" signifas plenumi la mision por li. Nome, kiam persono volas ripozi momente post ili laboras diligente, kaj kiam ili deziras malenuigi per spektado de la filmo post daŭrigo de malagrablaĵo, la aktoro vidigas plejble la gajan aktoradon al ili kaj ridegigas

ilin por doni revigliĝon kaj morgaŭan energion.

La misjuĝo ne estas nur en lernejo. Lastatempe ni estas preteratentemaj pri la graveco de intenco al la rolo, do ĉu ni estas devontigitaj vivi malgrase iom-post-iome? (Kompleneble, mi ne ĉiam neis la gravecon de intenco al la golo.)

Pasintatago, mi prizorgis pri la maljunulino. En la procezo, mi trovis unu malĝojigan aferon. Ŝi perdis sian edzon pro kancero en la hospitalo, kie mi laboras. La morto de sia edzo estis la kriza situacio por la maljunulino, kiu longe kunvivis. Akuta depresio kaj la akompana pseŭda demenco komencis ne pli malfrue ol 3 monatoj. Kiam ŝi vidis eĉ sian filon, ŝi demandis "kiu vi estas?" Kaj inter hospitala ĉambraro ŝi ĉiam promenadis. Mi rekomendis, ke estas pli bone prizorgi ŝin en la hejmo dum eĉ kelkaj monatoj. Sed mi recevis la respondon post unu semajno. "Ni volas prizorgi en nia domo, sed bedaŭrinde tiu ĉi jare la plej alta kaj la tria filo havos ekzamenon por universitato kaj la dua mezlernejo, respektive. Mi ankaŭ iris sola al mia laborejo por niaj filoj, kaj en nur semajnfino dum du jaroj venis al mia domo en Tokio. Mia edzino ankaŭ vivadas ĉiujn tagojn spirdetene por niaj kandidatoj. Ni timas, ke la patrino povas rompi la situacion."

La gepatroj kaj filoj, ambaŭ estas vivriska por la intencon de golo. Tamen rezulte, okazas strangaĵo tiel ŝi ne povas reiri al la hejmo malgraŭ la maljuna malsanulino havas bonan domon. Por kio ĝis nun ŝi vivas kaj klopodas? La celo de nia vivo ne estas forŝovi kaj venki aliajn, sed estas partopreni en la publika intereso per propra laboro. En la epoko ekstremanta de la biblia aserto "Ne malrespektu aliajn" (Korinto, ĉapitro 12), ĉu ni igas nian vivon riskoplena, altirate atenton al senlima konkura principo?

verkis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

5>> min kiel unu el la membroj de tiu granda vojaĝo " diras viro kaj etendas la manon por manpremi. Ĉi tiu perspektiva viro estas iomete neklara en la skripto kaj la filmo. Kion prezentas ĉi tiu fidela membro de la ŝipanaro? Ĉu la saĝo de la Oriento? Mi ne scias, tio ne estas sufiĉe klara. Ĝi ne havas decidan rolon en la agado de la filmo, sed la skriptisto eble volis riĉigi la filmon aldonante figuron el Usono kaj Irano (aŭ ĉu Barato?) en la ŝipanaro de la ŝipo, kiu ekvojaĝos el Danio. Mi ne sukcesis trovi alian informon.

Festo estas organizita ĉe la domo de astronomo Prof. Planetaros (la patro de Avanti) la nokton antaŭ la foriro. David Dean estas denov en la unua plano. Ni insiste vidas, ke estas la 12-a horo. Sennova bildo

kiel kadro de foto. Solstico kaj transformo de sorto. En alia ĉambro, sur la balkono, Kraft kaj la fratino de la Kapitano adiaŭas unu la alian. Poste adiaŭas la patro kaj lia filino kun kapitano Avanti.

Rigardante la ĉielon por la lasta fojo el la fenestro de sia ĉambro Avanti diras: "Planedoj, kiuj brilas kaj alvokas, mi venos."

Patro kaj filino ne povas dormi, kaj la sekvan tagon, kiam la preparadoj finiĝas, la zepelin-aspekta kosmoŝipo Exelcisor leviĝas en la aeron. En iu interreta kritiko mi rimarkis la vorton "grasa aviadilo". Sed ni ne devas fari malĝuston, ĉar en ĉi tiu periodo kaj la tiamaj kondiĉoj ĝi estas sufiĉe sukcesa desegnaĵo.

Post ses-monata vojaĝo la esperoj en la ŝipo



komencas perdiĝi. La ŝipanaro en la gvido de David Dean preparas ribelon. Nur la vickapitano kaj la orientano ne apogas ilin. Same tiel, kiel la ŝipanaroj en la maroj. La kapitano preparas sian armilon kune kun la dua kapitano. Sed kio estas tio!? Ili jam eniris la gravitan kampon de Marso kaj komencas alproksimiĝi al Marso kun dekobla rapideco ol normale.

Ili estas atingontaj sian celon. Ili ĉiuj genuiĝas kaj preĝas.

Ili preparas siajn oksigenajn maskojn kaj vestaĵojn kaj komenciĝas la alteriĝo.

Eĉ oksigeno ne necesas, ĉar la marsa atmosfero estas spirebla!

Marsaj gvidantoj kaj homoj bonvenigas la teranojn.

"Rigardu, ni komprenas ĉiun vorton, kiun ili diras sen paroli. Ili malkovris komunan lingvon, kiun povas kompreni ĉiuj animoj. Afero pri kiu ni jam aspiradis sed ne sukcesis atingi."

"Ni observas vian mondon de miloj da jaroj." ili diras, donante globon kaj invitas ilin kunmanĝi.

Unu el la plej gravaj partoj de la filmo estas en ĉi tiu sceno. Kontraŭ la marsa oferto de fruktoj, Planetaros alportas vinon kaj ladskatolon da viando de la ŝipo. La marsa reganto trinkas, sed ne ŝatas ĝin. Li flaras la viandan ladskatolon kaj demandas kio ĝi estas. La kapitano respondas, ke ĝi estas morta karno. La saĝa marsa reganto demandas, kiel oni preparas tion. La kapitano rakontas pri tio ĝuste tiam pafante al fluganta birdo. La marsanoj lin arestas. Dum miloj da jaroj oni pafon ne aŭdis sur Marso. Poste la homamasoj venas sur ili. La kapitano disponigas mangrenatojn. Unu marsano mortas. La reganto diras: "Milito kaj peko. Lia pentofarado estu pagota!".

Ili estas alkondukitaj al la juĝejo. Sangon kaj perforton oni ne plu volas sur ĉi tiu planedo.

La filino de la reganto, Marya, fariĝas defendanto de la fremduloj. Ŝi survestiĝas la pardonan kostumon.

"Ĉu vi juĝos nin?"

"Ne. Vi pagas pekliberigon por via peko nur konante vin mem. Ni ankaŭ trapasis la saman mallumon, batalante. Iam, ĉi tie sur Marso estis ankaŭ morto pro fero kaj fajro."

Marya en la bildo projekciita sur la muro montras la antikvajn primitivajn militajn tempojn. Ĝi similas al videoprezento. Vidante, ĉi tiun teknologion uzanta en la jaro 1918, oni ne miras pri la hodiaŭo, ŝajne ni ne multe progresis. Kineja fikcio jam estis solvita tiutempe.

"Nun juĝu vin mem!"

La kapitano kaj liaj kunuloj demetas siajn armilojn kaj Planetaros diras:

"Ekde nun ni ne mortigos iujn ajn vivan estaĵon kaj ni neniam plu uzos armilojn."

Kaj la marsano, kiu mortis pro la bombo, reviviĝas kiel Lazaro!

La monatoj pasas kiel tagoj por nia skipo kaj tre bonajn impresojn ili havas. Ĉio estas pura kaj senkulpa sur Marso, sed kio pri la mondo? Ni vidas scenojn de kvereloj sur la strato, kaj scenojn de distrado kaj hazardludoj.

La direktoro komparis la negativaĵojn de la mondo kun la utopia, paca medio de Marso. Volupto, drinkado kaj perfortoj kontraŭ la Ideala Planedo Marso. Ekzemple, ni vidas la Ĉastecan Dancon de la virinoj sur Marso. Homoj en arbaro inter floroj kaj trankvileco. Vegetaraj, senarmaj homoj. Ne estaĵoj, sed veraj homoj. La filmo prezentas al ni la "Paradizon sur la Tero", kiun ĉiuj sopiras. Ĉi tio estas nek Marso



kun la malpermesita sklavordo en la filmo "Aelita", nek plenplena de lumglavoj, laseraj pafiloj kaj strangaj estaĵoj kiel la plej multaj el la nunaj sciencfikciaj filmoj montras. Estas la longe sopirata mondpercepto de homoj, projekciita sur Marso.

Eble la detruado de la unua mondmilito kondukis la verkiston kaj scenariston Sophus Michaëlis kaj



reĝisoro-aktoro Holger-Madsen al tia temo kaj "feliĉa fino". Jes, feliĉa fino! Dubius ne povas atingi siajn petolemajn dezirojn, kaj en la fino de la filmo mortas pro fulmo ĉe la rando de klifo, kien li grimpis por malbenadi, kaj falas suben.

Lia fratino kaj lia patro, kiu jam provis sinmortigon, atendas ilin senespere kaj ĝojas la revenon de Excelsior kaj Avanti. Cetere ambasadoro de paco kaj saĝo, kaj fianĉino eliras kune kun Avanti el la kosmoŝipo: Marya la filino de la saĝa reganto de Marso.

Kio impresis min en ĉi tiu filmo? Ĝi estis filmita nur 16 jarojn post la "Vojaĝo al Luno" de Georges Méliès, la unua konata sciencfikcia filmo en la historio de kinejo (1902), kaj ĝi havas bonan kaj sukcesan enscenigon, ĝi estas granda produktaĵo por ĝia tempo kun riĉa rolantaro kaj ekstra-roluloj. Preskaŭ en la sama skalo de la nuntempaj hollywoodaj produktaĵoj. Kaj en Danio! Nek en la lando de Edison, lando de la unuaj sinematografiaj provoj aŭ "La imperio de kinoarto" : Usono, nek en Francio, en la lando de Fratoj Lumière! ...

Estas sendube, ke malantaŭ la unuaj produktoj de la kino arto estas granda amasiĝo de pentroarto kaj longa historio en la kampo de optikaj inventaĵoj. Sed tamen kino estas io alia; instrumentado kaj harmonio de moviĝanta fotado kun arto. Ĉar mi ne havas multajn informojn pri la reĝisoro, la verkisto kaj la komenco de kinoarto en Danio, mi komparas ĝin kun aliaj produktaĵoj de tiu periodo, nur el la vidpunkto de simpla spektanto. Mi dankas tiujn, kiuj restarigis ĉi tiun filmon.

Miaopinie ĉi tiu filmo ne estas malsupera de "Metropolis" (1927). Aŭ la filmo "La Virino sur la Luno" de Fritz Lang (1929). En la lasta numero de Turka Stelo mi verkis pri "Aelita" (1924) kaj "Kosma Vojaĝo" (1935). La "Ĉiela Ŝipo (Himmelskibet)" (1918) estas kaj ilia antaŭulo, kaj la pioniro de sciencfikcia kino.

En la komenco de la filmo tie, kie ni vidas la nomojn de la verkistoj, reĝisoroj kaj aktoroj mi vidis difinon, kiu interesis min: "Foto-ludo". Kinejo tiutempe, kino ankoraŭ en sia "infanaĝo" estis sub la influo de teatro, do ĉi tiu difino estas komprenebla kaj eĉ ĉarma laŭ mi. La aktorado ankaŭ troas, kiel en la plej multaj filmoj de la sama periodo. Tamen ne ĝustas interpreti filmojn nur de la hodiaŭa vidpunkto, necesas pensi laŭ iliaj propraj historiaj kondiĉoj.

Alia interesa afero estas: kvankam, en plej multaj fontoj, ŝajnas, ke ĝi estas adaptaĵo de novelo, la romano estas datita 1921. Mi trovis unu detalan fonton en la interreto, kiu diras, ke la aŭtoro Sophus Michaëlis verkis la romanon surbaze de la skripto. Mi supozas, ke ĝi estas eĉ iu alia varianto de la skripto.

Mi memoris la romanon "Mirinda Vojaĝo" de Isaac Asimov. Li ankaŭ unue verkis la skripton kaj poste reverkis la samnoman kaj iomete ŝanĝigitan romanon. Do la romano estas adapto de la filmo-skripto.

Lasu min doni al vi iun informeton: ĉu vi povas diveni, kiel nomiĝas la fratino de kapitano Avanti Planetaros! CORONA ! Mi konservis ĉi tiun "teruran nomon" por la fino de mia teksto. :-)

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
el Büyükkada insulo, Turkio
20 februaro 2021



Solve de la krucvorttenigmo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| | O | K | A | S | O |
| O | C | E | Ĉ | I | R |
| U | E | | A | E | F |
| S | E | J | | R | I |
| O | L | A | V | E | Ĉ |
| J | O | K | A | P | |

Vienaj legendoj

Kiu el la verda trupo ne konus Internacian Esperanto-Muzeon sub la granda kupolo de la Imperiestra Kastelo en la centro de Vieno? Tien pilgrimis – ŝi mem ŝerce uzis tiun vorton – Marisa, tridekdu-jara slovakino, por postspuri en flavaj paperoj kaj polvozaj volumoj la komencojn de la Esperanto-vivo en ŝia lando. Kiam ŝi alvenis tie la unuan fojon – post peniga grimpadado de 154 ŝtupoj finiĝantaj abrupte en ia subtegmenta, sinistra koridoro – ŝi preskaŭ ne havis kuraĝon sonorigi ĉe tiu malhela pordo, kiu, malgraŭ la tria etaĝo – ŝajnis konduki en ian malnovmodan inferon de Kafkaeskaj koŝmaroj. Akceptis ŝin moroza mezaĝulo, kiu evidentiĝis tamen pli kunlaborema kaj helpema ol lasis malbonaŭguri la unua impresoj. La rezulto de ŝia dokumentada laboro estis almenaŭ duone kontentiga: Ŝi trovis kelkajn interesajn indikojn pri la pionira periodo de Esperanto en Slovakio.

Tranoktante ĉe amiko, kiun ŝi renkontis dum la lasta UK, ŝi promenis post farita laboro tra la stratoj de la malnova Vieno, kie svarmis bunta turistaro internacia. Pleje ŝin allogis la luksaj magazenaĵoj fenestroj, kies elmetitajn komercaĵojn ŝi povis aĉeti nur perokule, ĉar la realan akiron eĉ de eta memoraĵo ne permesis la kruda maljusto de nepagipovo.

Sed eksidis en la kapo de Marisa kaprico: Unufoje manĝeti lukse! Ŝi memoris la rakonton de sia patrino pri la tramo, kiu jungis Bratislavon kaj Vienon en la tempoj de tiu onkleca, en ĉiuj rilatoj malfeliĉa kaj maltaŭga imperiestro Francisko Jozefo. Eĉ poste, ĝis la jaro 1939, Bratislavanoj povis veturi al Vieno kun la nura celo trinki Vienan kafon sur Graben, observante la ŝikajn ulojn kaj ulinojn tie paradantajn. Tiaj tempoj revenu! Ŝi sopire pensis, dum ŝia stomako komencis kraki pro troa malpleno. Supeton kaj poste kafon! Nerevokeble prezentigxis firma decido, kiu sonis pli forte ol la vejoj de ŝia magra monujo. En la centro de Vieno mem! Kiel en la tempoj de avinjo kaj panjo.

Ŝi alvenis al la luksa delikataĵejo „Meinl am Graben“, kiu en pompe ekipita salono ofertas ĉiutage tri ne tro kostajn, sed tamen delicajn menuojn. Marisa hezite eniris, kun miro ŝi vidis la ĉe marmoraj tabloj starantajn homojn, kiuj aspektis mondumaj en ŝiaj okuloj, sed verdire estis nenio alia ol iom snobe

tagmanĝanta oficistaro kaj turistaro. Manĝi starante ĉe tablo, nu bone! Almenaŭ ĉe marmoraj.

Heziteme ŝi legis la afiŝitan menu-liston, skribitan per gotikaj literoj, komencante per preza rubriko kaj haltis ĉe la cifero 24. Dudek kvar ŝilingoj, jen la plej malalta elspezo. Temis pri faba supo, kiun ŝi ĉiam volonte manĝas. Des pli bone! Tiel do estu! Ŝi iris al la memserva bufedo, mendis en preskaŭ senerare prononcata germana, ricevis blankan pelveton vaporantan, kiun ŝi portis al unu el la tabloj. Ŝi demetis sur la subtablan ŝtonan breton la kopiojn de la Muzeaj dokumentoj, volis ekmanĝi, sed subite rimarkis, ke ŝi forgesis kuleron.

Kiam ŝi revenis kun manĝilo enmane al la tablo, ŝi ne povis kredi siajn okulojn: Tie staris granda ulo negra, trankvile kulerumante ŝian supon! La diablo lin... trafumis ŝian cerbon tabua sakro. Sed antaŭ ol orelefende kriĉi, venkis ŝia internacia, de esperantismo nutrita sento, kiu insinue diktis al ŝi: Toleru la umojn de afrikano, venanta el tute alia kulturo, kiu eble propagandas la komunan supujon. Ĉu ne same en ŝia patrio antaŭ unu generacio ĉirkaŭtablanaro kampara manĝis el unu telerego? Al kio do servas la interna ideo, se ĝi eĉ ne toleras forkontinentajn morojn? Ek! Vivu la verda stel'!

Ŝi alpaŝis la nigrulon, sinĝene kaj iom tordbuŝe grimacis rideton kaj plonĝis la kuleron en la varman brogaĵon. La ulo stulte gapis! Tamen ŝia nevole komika rideto trovis baldaŭ eĥon en la bele malhela vizaĝo, kiu fandiĝis en bonkora mieno.


Unue silente ili kulerumis, sed Marisa baldaŭ preferis konversacii: „Ist die Supe gut?“ La germana ne efikis. „La soupe est bonne?“ Same la franca! La anglan ŝi ne scipovis. Lasta klopodo: „Gut?“ „Good!“ resonis la negro kun kamaradeca brilo en siaj okuloj. Jes, Esperante nia tagmanĝa interparolo pli prosperus! Ŝi amare pensis. Manke de vortoj ili daŭrigis la babiladon per pingpono de ridetoj, streĉe volitaj ŝiaflanke, kaj malferme bonulaj liaflanke.

Ĉiu supo iam venas al sia fino kaj pro tio ankaŭ la stranga eŭrop-afrika gemanĝado en „Meinl am Graben“. Per lasta rideto Marisa adiaŭis, ŝovis sian manon sub la tablon por preni la kopiojn – kaj palpis nur la breton. Kun ekscito ŝi perokule kontrolis la



>>21

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

| | |
|--------------------|-----------|
| Ĉeflingvo: | Kodo: |
| Esperanto (+turka) | Li-TUR-06 |

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds